

Lummo



2022: Montrealo atendas vin!



De la redakcio

Malfacilas kredi ke ni estas jam en novembro, kaj la jaro 2022 estas jam ĉe nia pordo. 2022 estos tre speciala jaro por ni en Kanado, ĉar estos la jaro, kiam okazos la unua ĉeesta UK, post la deviga dujara prokrasto. Kaj kiel LKK-ano, kaj KEA-estrarano kaj ESK-aktivulo, mi atentis la novaĵojn kaj ĝojas pri ĉiu plia bona paŝo en la bona direkto: la akcepto de plenvakcinitaj eksterkanadaj vojaĝantoj, la baldaŭa malfermo de la vakcinado al 5-11-jaraj infanoj, la permesoj ke restoracioj kaj aliaj lokoj en Kebekio funkcii je plena kapacito, ktp. Ĉiu plia paŝo sentiĝas kiel eta venko!

Sed ni certe komprenas, ke la pandemio ne finiĝos en 2022, nek verŝajne en 2023 aŭ eble eĉ poste. Do, nia maniero esti, agi, kongresi estos alia. Ni tutcerte portos maskojn interne, kaj la manpremoj kaj interkizado devos ankaŭ atendi iom — mi

tamen pensas ke tio estas malgranda “prezo”, por pagi por povi ĉeeste kongresi!

La laboroj de la LKK progresas. Kelkajn jam faritajn laborojn ni povis reuzi (antaŭkongreso, postkongreso), la aliajn ni devis rekomenci de preskaŭ nulo (iuj ekskursoj, kongresejo, ktp.). La laborojn malfaciligas la fakto ke UEA mem nun estas en transira stato, kaj multaj aferoj rilate la funkciadon kaj la respondecojn de la kongresa fako ne estas klaraj. Ni esperas ke la venontaj monatoj alportos pli da stabileco kaj klaro.

Ĉi-novembre la LKK denove bonvenigis al Montrealo la Konstantan Kongresan Sekretarion de UEA, Clay Magalhães, kiu jam plurfoje vizitis Montrealon. Ĉi-foje lia vizito koncentriĝis al UQAM, nia kongresejo de 2022. Estis bonega vizito — la belegaj, modernaj, lumplenaj teknike ekipitaj ĉambroj de la plej granda montreala universitato estas vere perfektaj por la kongreso!

Tiu ĉi duobla numero estas aparte bunta. Atendas vin artikoloj de la ambaŭ flankoj de Kanado — de Halifakso en oriento, kie intervjuiĝis ĉe Radio-Canada unu el lokaj aktivuloj, ĝis Viktorio en la okcidento, kie lastatempe eldoniĝis bela nova libro, kaj certe, ankaŭ el Montrealo, la gastiganto por la UK-2022! Aparte atentu la longan artikolon pri la vizito de Zamenhof al Ameriko. Bonan legadon!

Nova Estraro de KEA

La nuna estraro de la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) baldaŭ finos sian deĵorperiodon. Ĉiun duan jaron, KEA elektas inter ĝiaj voĉdonrajtaj membroj tiujn, kiuj konsistigas la estraro, ĝis maksimumo de dek-unu membroj. Se pli ol dek-unu homoj kandidatiĝas, la estraro devas okazigi referendumon de la tuta membraro. Ĉi-aŭtune, volontulis por servi en via estraro por 2022-2023 naŭ membroj. Pro tio, referendumo ne necesas. La novaj estraranoj estas:

- Ĵenja Amis, Montrealo QC;
- Raymond Brisebois, Londono ON;
- Garry Evans, Montrealo QC;
- Geoffrey Greatrex, Otavo ON;
- Elizabeth Holden, Otavo ON;
- Paul Hopkins, Sooke BK;
- Trefleo Mercier, Ŝerbruko, QC;
- Andreo Sly, Viktorio BK;
- Bob Williamson, Halifakso, NS.

Ili enoficiĝos kaj eklaboros la 1-an de januaro 2022, kaj unue elektos inter si la ĉef-estraranojn.

La estraro ĉiam bonvenigas viajn komentojn, proponojn, sugestojn, kaj oferojn. Retmesaĝu rekte al informo@esperanto.ca aŭ tra la KEA-retpaĝo Kontakto nin.

Halifaksa Aktivulo ĉe Radio-Canada!

Halifaksa buroo de Radio-Canada intervjuis halifaksan aktivulon, Andy Blair, pri Esperanto (franclingve). Ni gratulas al Andy pro la bonega



intervjuo! La elsendo, titolita *L'esperanto, une langue inventée parlée en Nouvelle-Écosse*, aŭskultebblas [ĉi tie](#).

The screenshot shows a web browser window displaying a page from Radio-Canada. At the top, there's a navigation bar with 'radio-canada' and a 'MENU' dropdown. Below that, the 'Ohdio' logo is visible. The main content area features a video player for 'Le réveil' with a duration of 2:55 min. Below the video, there's a 'Résumé' section with a recommendation: 'Cet extrait audio vous a été recommandé'. It includes a thumbnail for an audio segment titled 'L'esperanto, une langue inventée parlée en Nouvelle-Écosse' with a duration of 10 min. To the right, there's a video player for 'Du réconfort pour emporter' featuring a woman's portrait. The text next to it asks 'Comment se porte l'esperanto en Nouvelle-Écosse?' and mentions a community of Esperanto speakers in Nova Scotia. At the bottom, there are buttons for 'Voir tous les épisodes' and 'ici artv'.

KVaK'u kun mi!

Saluton el Su-Sankta-Mario [Sault-Sainte-Marie], distrikto Algoma, Ontario! Ĉi-julie okazis la dua Kanada Virtuala Kongreseto, en kiu Esperantistoj ne nur en kaj el Kanado, sed ankaŭ en aliaj partoj de la mondo, kunvenis por saluti unu la alian kaj pripensi la estontecon de Esperanto en Kanado.

De tiu flanko, la renkontiĝo estis agrabla okazo gustumi la karakteron de Kanada Esperantujo. Mi ĝuis la rakontadon de elstara komencanto en Tondro Golfo [Thunder Bay] pri naŭdek-naŭ-taga transkanada biciklovojaĝo.

De ĉi tiu flanko, la renkontiĝo estis sciiga okazo vidi la floriĝantajn planojn de la estraro kaj ankaŭ de aliaj eventestroj. Mi ĝuis aŭskulti ĝisdatigojn pri la venontjara okazigo de Paralela Universo, kaj bedaŭras, ke la pandemio duafoje nuligis la eblecon sendanĝere gastigi PU-eventon en mia urbo.

Sed, super ĉio, mi tre ĝuis aŭskulti pli da informoj

pri la okazonta UK en Montrealo en 2022. Mi ne scias, ĉu eblos al mi partopreni, sed ĉi tia evento ne ofte okazas kaj la ekscitiĝo estas kontaĝa. (Bv. pardonu la vortelekton!)

Kvankam mi ofte sentas min izolita en Su-Sankta-Mario, de mia starpunkto la anticipado de la evento estas vigliga kaj mi antaŭĝuas fieron pri tio, ke mia lando baldaŭ gastigos tiel gravan eventon. Se mi ne povos ĉeesti la UK-on, mi esperas iel kunhavigi la eventon en la propra urbo aŭ ĉeesti PU-eventon en

najbara urbo !

Kvankam estas sufiĉaj el ni en Kanado, preskaŭ ĉiuj el ni estas tiel apartigitaj, ke mi sentas min tute sola en la mondo. Certe eblas legi anoncojn interrete aŭ en la *Lumo*, sed la KVAK helpis al mi tiel, ke mi sentu min parto de pli granda movado. Ni kvaku refoje, karaj!

James Bridge



Kelkaj impresoj pri KVaK-2

La anonco pri la dua Kanada Virtuala Kongreso vortlude invitis: Rano kvakas. Anaso kvakas. Ĉu ankaŭ vi KVaKas? Nu, kvardeko de esperantistoj – inkluzive de mi mem – respondis jese al tiu demando kaj partoprenis la Zoom-an kongreson, kiun gastigis KEA, sabaton, la 10-an de julio, 2021.

Ĉeestis esperantistoj trans Kanado kaj eĉ kelkaj el aliaj landoj. La programeroj estis divers-specaj dum la evento de du horoj kaj duono kaj kiel planite ĝi plejparte fokusiĝis al Kanado kaj ĝia Esperanto-movado.

El la distraj partoj de KVAK-2 elstaris du programeroj. Skyler Roberts prezentis tre interesan prelegon kun fotoj pri transkanada biciklovojaĝo, kiun li faris kun bona amiko por ne nur esplori multajn urbojn kaj kamparajn regionojn, sed por samtempe kolekti monon por kontraŭbatali la malsanon Alzheimer memore al sia avo, kiu suferis de ĝi

dum siaj lastaj jaroj. En alia programero, Jessica Friesen bele kantis en Esperanto-traduko la kanton de Pete Seeger: “Where have all the flowers gone?” – “Kien iris ĉiuj floroj?” Ni memorigu, ke, dum KVAK 2020, Jessica ankaŭ belvoĉe prezentis kanzonon kaj tiam temis pri “Haleluja”.

Tre bona aspekto de la kongreso estis la diverseco en la enhavo. Dum unu parto, lokaj grupoj trans Kanado prezentis sin kaj siajn grupojn, kaj estis kelkaj programeroj, en kiuj ĉeestantoj estis kuraĝigitaj aktive partopreni per komentoj kaj demandoj. Fakte la tuto estis informoriĉa. Estis por mi

aparte interesaj la informoj pri la venontjara Universala Kongreso en Montrealo, kiujn prezentis Ĵenja Amis kaj la treege laborema Loka Kongresa Komitato. Ankaŭ ne mankis alia tre grava programero, nome tiu, kiun prezentis



Geoffrey Greatrex pri la strategiaj prioritatoj de KEA por 2021–2022. Eble valoras remencii tiujn prioritatojn ĉi tie: 1. Eldoni *Lumo*-n dufoje jare. 2. Organizati du virtualajn kongresojn (KVAK-ojn) jare. 3. Helpi la organizantojn (kaj starigontojn) de lokaj Esperanto-kluboj en Kanado. 4. Pliriĉigi la enhavon de la retejo de KEA. 5. Varbi inter esperantistoj kaj ne-esperantistoj (inkl. amaskomunikilojn) por la 107-a UK en Montrealo. Geoffrey emfazis la gravecon de la partoprenado de ni, la membroj kaj subtenantoj de KEA, por la realigo de kaj komentario pri tiuj prioritatoj. Do, ne hezitu kontakti KEA-on pri viaj ideoj aŭ viaj sugestoj, kiel vi mem povas helpi! Simpla maniero fari KEA-kontaktan estas per la ligilo: esperanto.ca/index.php/kontaktu-nin/

Do, KVAK-2 estis plena sukceso! Ĝia programo estis interesokapta kaj la organizantoj ankaŭ bonvenigis la komentojn kaj demandojn de la partoprenantoj. Dum la lasta parto de la kongreso ĉiuj povis kune babili en diversaj virtualaj ĉambroj, se ili volis tion fari, kaj tio sendube estis populara fino. Elkorajn dankojn al Bob Williamson, Andy Blair, Geoffrey Greatrex, Ĵenja Amis kaj al ĉiuj organizantoj kaj prezentantoj. Mi – kaj sendube aliaj – volonte atendas KVAK-3!

Bruce Crisp

Rezervu la daton: 28-a de novembro

Karaj kanadanoj! Ĉi-novembre lanĉiĝas senpaga reta koncerto de kebekia muzikisto kaj nova esperantisto Yves Desrosiers, kiu prezentas la albumon “Nokta Ŝoforo” en Esperanto. Estas planata sesio de demandoj-respondoj kun Yves la 28-an de novembro (dimanĉo), je 19:00 UTC (14:00 oriente, 11:00 pacifike). Pli da informoj ĉi tie: eventaservo.org/e/yvesdesrosiers21

Individuaj membroj de UEA ricevis la mesaĝon kun invito senpage spekti la koncerton en la Vimeo-kanalo de UEA. Se vi estas membro de KEA, vi estas ankaŭ estas aligita membro de UEA kaj rajtas spekti ĝin. Klaku tiun ĉi ligilon: vimeo.com/646976300 kaj metu la pasvorton: **miestasmembredeUEA**



Virtuala Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco (NOREK-2021)

NOREK kiel konferenco de parolantoj de Esperanto en Kaskadio okazis inter la 15-a kaj 17-a de oktobro virtuale, por du horoj tage.

Kaskadio (Cascadia) estas bioregiono kaj bioregiona movado

situanta ene de la okcidenta regiono de Nordameriko.

Eblaj limoj malsamas, kun kelkaj

desegnitaj laŭ ekzistantaj

politikaj ŝtataj kaj provincaj

linioj, kaj aliaj desegnitaj laŭ

pli grandaj ekologiaj, kulturaj, politikaj, kaj ekonomiaj limoj. La limoj estas ĝenerale tiuj difinitaj fare de la Kaskadia Bioregiono (Cascadia Bioregion – legu pri ĝi [ĉi tie](#) en la angla).

La proponita lando aŭ regiono plejparte konsistis el

la kanada provinco Brita Kolumbio kaj la usonaj ŝtatoj Vaŝingtonio kaj Oregono, inkluzive de gravaj urboj Seatlo, Vankuvero kaj Portlando. Se oni inkluzivus ĉiujn partojn de la regiono, de marborda

Alasko ĝis Norda Kalifornio suden, Kaskadio ankaŭ enhavus partojn de Idaho, Montano, Nevado, Utaho, Vajomingo kaj Jukonio. Pli konservativaj aktivuloj proponas limojn, kiuj inkluzivas la teron okcidente de la spino de Kaskadia montaro kaj la

okcidentan flankon de Brita Kolumbio.

Ne ĉiuj Esperantistoj apartenas al la Kaskadia movado, sed 'norekanoj' plejparte venas el tiuj regionoj.



La 31-a NOREK komenciĝis la 15-an de oktobro per prezentoj pri memoroj, fotoj kaj historio. Arlyn Kerr el Seatlo, WA, poste faris kvizojn kaj ludojn per Zoom. Anne Neave el Kamloops, BC, faris eminentan prelegon kun videoj, kies titolo estis "Elon Musk kaj la Ruĝa Planedo". Babilado okazis kiel eble plej neformale por imiti Interkonan Vesperon.

La 16-an de oktobro Ray Redd el Everett, WA, faris ilustritan prezenton pri la arbaraj fajroj en okcidenta usono. Sekve, la LKK por la 107-a UK en Montrealo pere de Ĵenja Amis, Zdravka Metz, kaj Normand Fleury parolis helpe de fotoj pri la venonta kongreso, ŝanĝoj kaj similecoj inter la nuligita UK de 2020 kaj la aktualigota de 2022.

La 17-an de oktobro Lottie Ericson de Viktorio priparolis fotojn pri sia vojaĝo en la norda Kanada teritorio de Yukon somere de 2021. Olga du Temple el Sidney parolis pri la Mistero de Kajlaŝo, monto en Ĉinio, kie vaste konata legendo diras, ke en la monto Kajlaŝo situas unu el la enirejoj en fablan landon Ŝambhalon. Tie loĝas estaĵoj ekipitaj per supernaturaj kapabloj.

Lottie Erickson kaj mi, sen supernaturaj kapabloj, tamen estis kontentaj pri la 31-a NOREK.

Wally du Temple

Unua Bulteno por Montrealo-2022!

La Unua Bulteno por la Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Montrealo en 2022 jam aperis! Vidu ĝin en la retejo de UEA kaj aliĝu nun! uea.org/pdf/uk2022/UnuaBulteno2022.pdf

“Post la deviga du-jara interrompo pro la pandemio, Montrealo, ree, pretas gastigi la Universalan Kongreson! Se vi jam planis partopreni la Montrealan UK-on, ni esperas ke Montrealo estas denove en viaj planoj! Kaj se vi ne pensis veni en 2020, jen bela okazo viziti nin en 2022!”

107-a Universala Kongreso de Esperanto
Montrealo, 6 – 13 aŭgusto 2022



Laŭ la Ruĝa Linio de Montrealo


Ne temas pri nova metro-linio de Montrealo (fakte ruĝan metro-linion oni planis en 1982, sed finfine neniam konstruis – nun estas nur blua, verda, flava kaj orangkolora linioj). Sed, piedirantoj tra la urbocentro de Montrealo ĉi-somere certe rimarkis jen kaj jen ruĝan linion pentritan sur la trotuaron.

Kio ĝi estas ? Temas pri Le Sentier du Coeur de L'Île (Pado ĉe la Koro de l'Insulo), 15-kilometra pado, kiu pasas preter multaj el la plej gravaj vidindaĵoj de la urbocentro, inkluzive La Placon de Festivaloj, la Universitatojn de McGill kaj UQAM (kie cetere la Universala Kongreso de Esperanto okazos en aŭgusto 2022), la tri katedralojn, kaj la gejan vilaĝon. Interese, ĝi ankaŭ vagas tra malpli konataj (sed tamen ĉarmaj) kvartaloj malantaŭ la grandaj stratoj, kiel Shaughnessy

Village kaj Strato Atateken. La linio estas cirkla, do ne estas oficiala komenco aŭ fino. Vi komencu de ie ajn. Kaj kompreneble ne necesas marŝi la tutajn 15 kilometrojn en unu fojo.

La pado, iniciato de la Turisma Oficejo de Montrealo, La Kvartalo de Spektakloj, kaj Montrealo Urbocentro, estas inspirita de la similaj Ligne Verte (Verda Linio) en Nantes (Esperante : Nanto, Francio) kaj la Freedom Trail (Libereca Pado) en Bostono, Usono. Ĝi malfermiĝis nur meze de julio ĉi-jare.

Laŭ la pado estas 67 ŝildetoj, kun QR kodoj, kiuj ligiĝas al retejo kun informoj pri la loko kaj gvidas vin al la sekva vidindaĵo. Ankaŭ – almenaŭ dum la somero – estas diversloke seĝoj por ripozi, artaj instalaĵoj, balanciloj, urbaj ĝardenoj, eĉ semajnfine





muzikaj koncertoj kaj spektakloj de dancado ktp. Informojn oni povas legi en la franca aŭ la angla ĉe <https://www.lecoeurdelile.com/>

La pado estas tre facile sekvebla, pro tiu ĉiea ruĝa linio (kvankam, en la plej historiaj partoj de la urbo, ĝi iĝas dum mallonga distanco tripunkta linieto por ne difekti la belecon de la vidaĵo).

La nova pado eble maltrafas kelkajn interesajn vidindaĵojn de la urbo. Ĝi ne tuŝas, ekzemple, la monton Mont Royal, nek atingas la rivereton Sankta-Laŭrenco. Sed fakte estas alia pado, La Promenade Fleuve-Montagne (Promenado Riverego-Monto), 4-kilometra pado malfermita en 2017 por jubili la 375-an datrevenon de la fondo de Montrealo, kiu iras ĝuste de la malnova haveno apud la riverego ĝis la eniro al la monto,

de kie vi povas (se vi estas sufiĉe bone trejnita) grimpi ĝis la montopinto. Vidu (france aŭ angle)

- ville.montreal.qc.ca/fleuve-montagne/fr
- ville.montreal.qc.ca/fleuve-montagne/en

Por vizitantoj al Montrealo (aparte dum la UK venontjare), kiuj volas trankvile marŝi tra la urbo, ĝojante la etoson, fojfoje haltante por spekti artaĵon aŭ gustumi kafon aŭ manĝeton, mi povas forte rekomendi la du padojn kiel la plej bonan manieron ĝui la urbocentran vivon.

Garry Evans


Unue aperis en La Reta Riverego



Bela Joe parolas al vi!

Ĵus aperis nova libro en Esperanto!

Saluton, karaj Esperantistoj, infanoj, junuloj, plenkreskuloj! Bela Joe ĉi tie. Marshall Saunders, kiu donis al mi voĉon rakonti mian historion, ege deziris, ke ĝi estu en Esperanto, kaj feliĉe ŝia amiko, James Blaikie, Esperantigis ĝin por ŝi kaj vi. La unua eldono estis tiel populara, ke ĝi tute elvendiĝis. Mi volas danki al miaj samlandanoj, kanadaj parolantoj de Esperanto, pro tio, ke ili organizis la duan eldonon por vi. Mi invitas vin viziti mian retejon: beautifuljoe.org. Ĉi tiu retejo temas pri mi kaj la Societo, kiu portas mian nomon, 'La Heredaĵa Societo de Bela Joe'. Ĝi formiĝis en 1994 por helpi konservi, honori kaj ekspozicii mian vivon kaj la literaturajn kaj homajn atingojn de Margaret




Marshall Saunders (1861-1947), la aŭtorino, kiu tre afable verkis furorantan libron pri mia vivo kaj donis al mi voĉon por ke mi povu rakonti al ĉiuj pri tio, kiel gravas neniam perdi esperon, eĉ kiam la

probabloj estas kontraŭ vi. Estas eĉ teatraĵo verkita pri mi, kaj ĉiuj diras al mi, ke ĝi ankaŭ estas mirinda!

Kiam vi trarigardos la paĝojn en ĉi tiu retejo, vi vidos la tutan laboron faritan, por ke bestoj ĉie neniam devos suferi kiel mi suferis. Ne maltrankviliĝu, mi estis savita per la afabla familio Moore el

Meaford, Ontario, kaj ili donis al mi la tutan amon kaj sekurecon, kiun la homoj de la "La Heredaĵa Societo de Bela Joe" volas por ĉiuj bestoj tra la mondo. Re-rakontante mian historion, miaj amikoj



ĉe la Societo kapablas viviĝi mian esperigan mesaĝon. La Societo ĉiam plibonigas kaj prizorgas la mirindan parkon de 8,5 akreoj nomatan La Parko de Bela Joe, kiu estas en mia hejmurbo, Meaford, Ontario, kie mi ripozas en tombo. Mi amas mian parkon kaj tre fieras pri la aliaj monumentoj en ĝi, kiuj memorigas polichundojn, servohundojn kaj dorlothundojn el la tuta mondo. Se vi perdis vian amatan hundamikon, mi invitas vin honorigi tiun per memortabulo en mia parko! Konservante ĉi tiun belan parkon, ni esperas fari la urbeton Meaford, Ontario, internacian vizitlokon por bestamantoj. Kiam vi pensas pri tio, kion mia specio donas al siaj homaj kunuloj, indas fari ĉi tiun penon por certigi, ke ĉiuj partoprenas sanan kaj feliĉan besto-homan interligon

Wallace George du Temple

Detaloj pri la libro:

ISBN

978-1-03-910679-6 (Durkovraĵo)

978-1-03-910678-9 (Molkovraĵo)

978-1-03-910680-2 (e-libro)

Aŭtoro: Margaret Marshall Saunders

Redaktoro: Wallace George du Temple

Dezajnisto: Cissie Tasai-Kierstead.

Kanada Esperanto-Asocio, 2021 (dua eldono)

Por mendi, vizitu tiun ĉi ligilon:

[books.friesenpress.com/store/
title/119734000092803569](https://books.friesenpress.com/store/title/119734000092803569)

*Legu artikolon pri aliaj lastatempaj kanadaj libroj
pli poste ĉi-numere — Red.*

Dikulino

Mi provas la novan robon. “Dikulino” — mi aŭdas de la apuda ejeto. Areto da adoleskantoj surmetas novajn vestaĵojn. Mi scias kion ekzakte ili faras. Ili fortranĉas la etiketojn, surmetas la vestaĵojn — plurajn samtempe — kaj poste, aldone al tiuj, remetas la malnovajn. Ili aĉetas 1-2 aferojn, por ŝajnigo. Mi diras nenion. Ili faru kion ili faras, sed kial diable insulti min? Mi provas trovi la robon kiu kaŝas la dekon da kilogramoj kiujn mi gajnis ekde la pasinta marto. Mi ankaŭ strebas trovi la vestaĵojn, kiu kovras la du tubojn, kiuj iras rekte en mian koron. Unu blua, unu ruĝa: kiel du tentakloj, ili pendas de mia brusto. Mi vivas danke al ili nun... Mi sentas, ke la vortoj de la adoleskantoj tranĉas min pli profunde ol la tuboj, kiuj iras rekte en mian koron...

Ĵenja Amis

Trafiko haltas

Mi estas en la hospitalo kun mia patrino. Ŝi havas rendezuon por ultrasona esploro, kaj mi akompanas ŝin. Oni ĝenerale ne permesas

akompanantojn, sed mi estas escepto ĉar ŝi ne parolas angle aŭ france. Oni mezuras nian temperaturon per nigra aparato, kiu aspektas kiel mikropafilo, demandas la rutinajn KOVIM-demandojn: “Ne, ne, ne, ne, ne...”. Ni jam konas la demandojn parkere. Ni enfrotas en la manoj malbonodoran manpurigilon el enorma blanka botelo, kaj ricevas novajn bluajn maskojn. Okazas

io. Du severaspektaj altaj gardistoj en bluaj uniformoj kaj neridetantaj vizaĝoj blokas eniron kaj eliron de la koridoro. La trafiko haltas. Kio okazas? Ĉu terorista atako? Kiel kanade, eĉ se ni panikis interne, tio ne montriĝas. Fine venas la informo — oni transportas KOVIM-pacienton. Oni devas ne alproksimiĝi. De malproksime mi vidas ŝin. Estas maljuna virino. Ŝi havas spiraparaton. Ŝi ne moviĝas...

Ŝin akompanas areton da homoj en flegistaj vestaĵoj kaj kelkaj gardistoj. La paciento devas preni la lifton supren. La liftoatendado daŭras eternon... Mi silente preĝas por tiu virino kaj ŝia familio... Dio gardu ŝin...

Ĵenja Amis


La ambaŭ nekonkursantaj noveloj de INK unue aperis en la [retejo de ALE / INK](#)



Ĉielarkoj

Nekonkursanta novelo de INK: Interkultura Novelo-Konkurso

Mi kolektas ĉielarkojn. Jes, same kiel la sinjoro el la novelo “Kolektanto de Ĉielarkoj” de Tibor Sekelj. Mi prenas ilin ĉiujn — la verajn, kiujn mi vidas trans la riverego post la pluvo, kaj la artefaritajn. Tiuj lastaj tre abundas ĉi-momente. Mi ne fidis mian memoron, kaj mi uzas mian poŝtelefonon por “kapti” ilin. Poste mi dividas ilin kun amikoj en Fejsbuko. Mi vidas ĉielarkojn ĉie — elmontritajn sur la pordoj kaj fenestroj de Montrealaj domoj, vendejoj, faritajn per kolora kredo sur trotuaroj, printitajn sur afiŝoj kaj flagoj, desegnitajn rekte sur fenestroj, faritajn per manĝaĵ-kolorigilo sur kukoj en vendejo, kaj per aliaj rimedoj sur la pordoj de la hospitaloj, la metroo, taksioj... “Ĉu oni devas preni permesilon de la urbo por havi senĉielarkan fenestron?” Tiu penso ridetigas min. La plejparto el ili staras sur pufaj nuboj, sed estas ankaŭ sennubaj ekzempleroj. Ili estas de ĉiu grandeco kaj dizeco, ofte ĉarme desegnitaj de infanoj. Jen allogis min ĉielarko sur la ŝildo de aŭto — kaptante ĝin mi konstatis, ke la aŭto efektive estas polic-aŭto. Mi devis doni klarigon al policistino pri tio, kion mi faras. “Ha, ĉielarko, jes-jes”. Ni babilas, bondeziras kaj





mi pluiras kolekti aliajn ĉielarkojn en mia kvartalo. El tiuj ĉielarkoj mi kunkudras videon en marto 2020, kiun mi afiŝis en Facebook de la prokrastita Universala Kongreso.

Kelkajn ĉielarkojn mi mem kreis: unu mi desegnas per akvarelo, por poste fari el ĝi la Esperantan poŝtmarkon por la kompatinda Universala Kongreso 2020, nuligita. Jen bona demando por kvizo post 50 jaroj: “La unua Esperanto-poŝtmarko en Kanado estis eldonita por la UK, kiu ne okazis — jes aŭ ne?” Jes... bedaŭrinde... Mi metas alian ĉielarkon sur la poŝtkarto, kiu invitas al Montrealo-2022. Ĝi iras super la ĉiellinio de la urbo. “2022: Montrealo atendas vin”. Kie normale

Universala Kongreso en Montrealo



*Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!*

L. L. Zamenhof



estas nigraj linioj por la adreso, mi aldonas ĉielarkajn liniojn. Mi antaŭguas skribi sur ili la adresojn de amikoj kaj sendi al ili la ĉielarkan poŝtkarton kun ĉielarka poŝtmarko el Montrealo. Ili travojaĝos multajn landojn. Ili iros al Brazilo, Usono, Malto, Svedio, Luksemburgo, Francio... ili iros ĉien. Kelkaj ankaŭ restos en Montrealo kaj aliaj vojaĝos al aliaj Kanadaj provincoj. Mi esperas, ke niaj montrealaj ĉielarkoj portos ĝojon al siaj ricevantoj, en tiu malĝoja jaro... Mi esperas, ke multaj el ili venos al ni en 2022. Montrealo atendas vin... Mi atendas vin. Ni atendas vin.

Ĵenja Amis

Kristnaska fabelo

Tio, kion mi al vi rakontos, ne estas unu el tiuj malnovaj fabeloj transdonitaj de generacio al generacio dum longaj vintraj noktoj, sed niaepoka okazintaĵo — tia, kia eĉ nun povas foje okazi en niaj grandaj urboj.

Antaŭ iom da jaroj, iuvespere — estis fakte la vespero antaŭ Kristnasko —, viro paŝis sola en la strato. Ĉu juna, ĉu maljuna? Mi ne scias. Sed li sentis sin maljuna, kaj nenion plu atendis. Li promenadis tra la centraj homplenaj kvartaloj de la urbo, kaj horon post horo prokrastis sian revenon hejmen, al sia fora kaj soleca loĝejo.

Eble tamen li ne estis tiel melankolia, kiel oni povus imagi. En la voĉoj de la homoj, en iliaj gestoj, en tiu apartspeca malvarma aero, kiun oni spiras, kiam neĝo falas kaj ĉion iom post iom ekkovras — li provis kapti... la spiriton de Kristnasko, per kiu li sopiris pleniĝi.

Intertempe fariĝis malfrue. Li ekkuris, esperante trafi la lastan buson hejmen. Jen ĝi, atendanta! Frapinte ĉe la pordo, senspire, kaj kun tiu bela rideto, kiun montras ĉiuj homoj kure trafintaj sian buson, li engrimpis, ĵetante “Feliĉan Kristnaskon!”, kun sincera gajo, kiu lin mem surprizis. Tuj ekveturis la buso. Li rigardis sian brakhorloĝon: “Ho! La buso malfruas kvin minutojn!” Strange, li estis la sola pasaĝero. Sed tion li ne atentis kaj komencis babili

kun la ŝoforo. Pri ĉio kaj nenio. Eniris neniuj aliaj en la buson, kiu rapidis en la neĝo, laŭ la stratoj kvazaŭ novaj kaj virgaj. Ilia konversacio fariĝis pli intima. Ili rakontis unu al la alia la momentojn plej belajn, kaj tiujn plej malfacilajn en siaj vivoj. Malnovaj poemoj delonge forgesitaj revenadis al ilia memoro. Inter iliaj interŝanĝoj, silentoj longaj — pacaj... Jarojn poste, tiujn silentojn li plej klare memoris.

Tagiĝis. La buso senmovis. Li pensadis. “Jen! Strange, la ŝoforo foriris.” Sed, vidante la lokon, kie li troviĝas — la lokon mem, kien li kurante alvenis la antaŭan vesperon —, la neĝon daŭre falantan, la homojn ekstere atendantajn trankvile, en tiu radia blankeco, tiam li eksuspektis, ke tiu ŝoforo eble ne estis ordinara busŝoforo.

Dum ili parolis, ili neniam menciis siajn nomojn. Ĉu oni diras sian nomon al busŝoforo, aŭ al pasaĝero? Sed, enirinte poste sian loĝejon, kun tiu sama sento, delonge ne spertita, tiu sento havi antaŭ si sian tutan vivon, li ĵetis sin sur la telefonon kaj vekis amikon sian... “Tute ne! Ververe! Liaj rakontoj ĉiam temis pri malvarmo, neĝo... Kaj, Dio mia, nun mi ekkonscias — mi ne scias, kial mi ne rimarkis tion — liaflanke estis iuspeca, ŝajne plenplena, strangforma sakego!...”

Francisko Lorrain

Nekonkursanto novelo de INK

Pandemia Defio Kanua

Pandemio paralizis Kanadon komence de 2020. Mia frato kaj mi komencis surporti maskojn kaj obei la ordonojn de la Ministerio de Sano pri homa distancigo, pri lavado de manoj kaj evito de homamasoj. La vendejoj estis fermitaj, kaj la restoracioj, eĉ la bier-trinkejoj!

Foje ni rigardis unu la alian silente. Kvankam mi ĉesis fumi pipon antaŭ jaroj mi prenis pipon enmane, malfermis ujeton da tabako, la aromriĉa ‘Erinmore’, fingrumis la foliojn ĝuante la parfumon, plenigis la pipon, ekflamigis la enhavon kaj malrapide suĉis la fumon en miajn pulmojn.

“Mi lastfoje fumis ĉi pipon, kiam ni kanuis sur la rivero Nahanni,” mi diris al mia frato Bari. “Tre sukcesa vojaĝo,” mi daŭrigis, “sed mi memoras, ke vi planis pli danĝeran, pli defian ekspedicion, sed ni ne faris tion pro via ampariĝo kun Bob. Sed nun kion fari? Pasis multe da jaroj. Via kara Bob mortis pro KOVIM-19 kaj ni ankoraŭ funebras. Ni ambaŭ estas pensiuloj kaj vidvoj. Kial ne plenumi tiun planon? Vivo aĉas pro la pandemio.”

“Jes, vi pravas,” respondis mia frato. “La variantoj de Kovid-19 ekinfektas homamasojn en nia regiono. Mi preferas la defiajn danĝerojn de la

rivero Liard ol atendi pasive ĉi tie, ĝis mi malsaniĝos, sufokiĝos pro manko de oksigeno kaj mortos kiel mia amanto tute senpova, senhelpa en ŝtopita koridoro de tro okupita malsanulejo.”

Mia frato kaj mi, pensiitaj instruistoj de historio, estis ambaŭ perdintaj la lastan uncon da optimismo pri la estonta bonfarto de la natura medio, de la daŭripovo de civilizacio – pro klimat-ŝanĝiĝ-neantoj, pro la malsatigoj en Jemeno, pro la etnaj genocidoj, pro la senpoveco de UN kaj la kreskanta rasismo. Kiajn mondskalajn apokalipsojn ni atendu?

Ni konsciis, ke alfronti la defion de la ‘Kanjono de la Diablo’ de la rivero Liard estas kiel ĵet-endanĝerigi niajn korpojn, same kiel montgrimpantoj de Everesto, aŭ kiel solaj ĉirkaŭterglobaj velbarkistoj.

La brita kompanio Hudson’s Bay Company, kiu aĉetis kaj kolektis kastorajn peltojn de la indiĝenoj en norda Kanado navigis tra tiun kanjonon tridek jarojn, en nordaj kanuoj tridek-futaj, ĝis kiam mortis naŭ viroj kaj perdiĝis du kanuoj, kun granda ŝarĝo de kastoraj peltoj. Post tiu tragedio oni elektis eviti la kanjonon per longa ter-

transportado.

Pretige, ni tage iris kanui en la rivero Koŭiĉan en la Vankuvera insulo.

Niaj muskoloj plendis, sed persiste ni trejnis nin, helpe de frotŝirmaĵoj, vitaminoj kaj testosterona hormona fortigilo.

Estis jam fin-aŭtune, kiam ni decidis defii la timindajn akvojn de la rivero Liard. Pro la varmega kaj senpluva vetero, arbaraj incendioj estis okazintaj en Kalifornio kaj nia provinco. Malpli da akvo en riveroj ŝanĝas la agmanieron de river-fluado. Kion anticipi?

Nian dekok-futan kanuon el kanvaso kaj ligno Bari nomis 'Nur Mi'. Li lernis Esperanton de mi. Mia filo Evan, denaska Esperantisto, konsentis kontraŭ sia propra sento veturigi nin norden per kamiono. Li opiniis, ke ni estas malfort-mensaj maljunuloj iel suferantaj de pandemia deprimio. Tamen lia kontraŭstaro ne sukcesis. Li promesis reveni por kolekti nin ĉe la gastejo Bufo, kie la rivero Bufo atingas la ŝoseon Alaska.



Nia plano estis progresi nordorienten per la rivero Liard kun la fluo, kaj poste sudokcidenten per la rivero Bufo kontraŭ la fluo ĝis la renkontiĝa gastejo. La rivero Bufo estas alfluanto de la Liard.

Ni veturis al mejlo 497 de la aŭtovojo Alaska, kie ponto transiras la riveron Liard. Tie situas turista gastejo, kiu nomiĝas 'La Varmaj Fontoj de Rivero Liard', ĉe 59° 25' 40" norde, 126° 06' 15" okcidente. Provincan parkon oni establis tie en

1957, pro tio ke la tiea komplekso de termofontoj havas nacian ekologian signifon kaj estas konata pro ĝia natura ĉirkaŭaĵo en la abunda norda picea arbaro. La parko estis fermita. Tial mia filo decidis ripozi en la gastejo, sed ni kontraŭleĝe iris

en la parkon por malstreĉiĝi antaŭ ol ekendanĝerigi niajn vivojn venont-tage. Ni sekvis flosantan ligno-padon, kiu kondukis al la termofontaj naĝejoj, kaj trairis varmakvan marĉon. Alkojn manĝantajn ni preterpasis. Ni senvestiĝis kaj nude naĝis en la varmfonto Tropika Valo, kie dekkvar specioj de orkideoj abunde kreskas en tia varma etoso. Alfiksita al stango

avertis turistojn jena aŝiŝo, 'Rekomendo: Cedu la varmfonton al ursoj.'

"Mi ne sciis, ke ursoj ŝatas orkideojn", ŝercis mia frato. Malfeliĉe mi lasis mian pafilon en la kamiono.

Ni tranoktis en la gastejo kaj matene adiaŭis kaj dankis mian filon lanĉante nian kanuon apudponte. De tie ni pagajis sep mejlojn kaj albordegis, kie estas enir-komenco de transporta terojeto por eviti ne-navigeblan, ne-trapaseblan lokon, kie la akvoj de la Liard estas pelataj perforte tra etan breĉon de granita montmuro. Nenio, eĉ alkoj aŭ pumoj, povas travivi en tiuj akvoj.

La monteca vojeto, neuzita de multaj jaroj, devigis nin uzi maĉetojn, hakilojn kaj svedajn mansegilojn por fari ĝin trapasebla. Ĉiunokte ni dormis sub oraj arboj betulaj. Ni sentis, ke ni dormas en katedralo. La mondo mem estas preĝejo. Sunradioj ĉe tagiĝo kaj je krepusko kreis magiajn ŝablonojn sur la falintaj kaj falantaj flavaj folioj. Ni povis aŭdi la riveron ŝveli, fajfi kaj turniĝi en amaskirlejoj, kaj eksplodi tumulte supren kun bruegoj de malbonaŭguraj perturboj, kiuj tondre avertis pri la malfacilaĵoj, kiujn ni devis poste alfronti. Descendinte en ovalan valon, la akvoj subite silentis kaj vagis en lagunon, kie ili ekkuŝis en multflueca meditado.

Ni kampadis tie dum kelkaj noktoj, ravitaj de sentoj de paco kaj pasio. Ni naĝis lagune, fiŝkaptis arktajn timalojn kaj ĝuis kuirin ilin per tenduma fajro, kies flamoj estis reflektitaj en nigra akvo sub nokta ĉielo de briletantaj steloj de nia galaksio. Mi sentis min kiel eta interdependa parto de la fragila fadeno de la biosfera vivo.

Matene de nia intencita foriro unu kanada ansero faris gigantajn kirliĝantaj spiralojn malsuprenirante de la ĉielo por ripozi lagune. Kiel strange! Unuopa birdo, kvazaŭ perdita el migranta aro. 'Ĉu ĝi estas malsana?' mi pensis. En tiu momento mia frato pafis ĝin per sia fusilo de kalibro .22. Sed li nur vundis ĝin. La birdon nun kripligitan li pafis denove. "Mi kaptis vespermanĝon", li kriis, sed la mortantan anseron nun kaptis la riverkurento kaj ekspedis la kadavron funebre orienten laŭ la fluo, tien, kien post ne longe, ni estus devintaj sekvi.

Superstiĉa psika febro kaptis mian koron kaj mi kriaĉis al mia frato: "Damninde, ĉu vi estas analfabeto, ĉu vi neniam legis 'La Poemon de la Antikva Maristo' de Coleridge?"

Tia pafado de senkulpa, libera kaj sovaĝa birdo kiel albatroso povus kaŭzi al ni – same kiel en la balado – penadon, eĉ tragedion, kaj postuli pentofaron. "Al diablo kun tio", li diris.

Matene ni metis nian kanuon en la lagunon kaj sekvis la birdan kadavron. Variaj ekblovoj de seka vento. Post ne longe nia kanuo estis tiritita orienten de la ĉefa fluo. Baldaŭ ĝi kaptiĝis en larĝa kirliĝanta vortico, kiu suĉis la kanuon flanken kaj malsupren tiel, ke la kanuo estis turnita naŭdek gradojn. Amasiĝinta akvomonto levis nin kaj ĵetis nian kanuon vivoriske al la rivera bordo. La ligna pruo de la kanuo krakis kontraŭ kruta ardez-argila rok-lavango, kiu elstaris de la kanjona muro. La pruo kurbiĝis pro rompita ligno, sed la ekstera kanvaso kunligis la lignajn ripojn tiel, ke la kanuo, kvankam duonplena de akvo, povis ankoraŭ flosi.

Sekvis senhelpa kadavra flosado, dum ni pene provis akvon elŝuti. Silento regis la aeron inter ni fratoj.

Finfine, la rivero plilarĝiĝis kaj meze de ĝi elstaris insulo nomita de la francaj felo-komercistoj 'Île de Gravois'. Ni devis pasigi ses tagojn sur la insulo por sekigi ĉiujn niajn provizojn kaj fari krizajn riparojn al la kanuo. Pipojn ni fumis, kaj trinkis botelon da rumo. Restis plia botelo kaj du skatoloj da tabako. Feliĉe, pro niaj spertaj preparoj niaj varoj, manĝaĵoj, ekipaĵoj kaj krom-pagajoj restis sekurigitaj, aŭ en alligitaj sakoj aŭ alfiksitaj al la boatrandoj. Neniel ni povus plene ripari la ŝvelon kaj kurbiĝon de la pruo. Stirado estus pli malfacila. De nun ni devis ekvilibrigi la kanuon tiel, ke pli da

pezo estu en la pobo, tiel levante la pruan.

Forirante ni eniris la kanjonon Muldilo, kies trankvilaj akvoj finfine gvidis nin al plej danĝera aperturo nomata 'La Torentaĵoj de la Dronintoj'. La loko gajnis tian nomon post la perdo de kanuoj, kiuj renversiĝis kun la morto de pluraj viroj. Ni alboridiĝis por fumi pipojn kaj legi la konsilojn de la esploristo McConell, kies tagĵurnalono ni kunportis.

Li skribis, ke la plej granda risko estas en loko, kie minaca elstaraĵo de tri fingraj ungegoj el roko blokas la kanalon. Li nomis ilin 'La Dentegoj de Nemezo'. Li diris, ke necesas kalkuli la tempon inter la supren-eksplozaj akvofuneloj kaj akvokirliĝoj. Kiam oni akurate kalkulas, eblas pasi inter ili. Ni silentis. Ni okulgapis. Ni gardis la kanuon, pipojn fumis. Ni urinis nerveze. Sed necesis antaŭeniri antaŭ la krepusko. Ni spektis la sinsekvajn supren irantajn ondegojn, kaj precize post la unua eksplodanta akvofunelo ni ekis.

Inter la dua kaj tria el la Dentegoj nia kanuo renversiĝis. Naĝantaj, ni ambaŭ kaptis la savrimenojn ĉe la boatrandoj. La renversita kanuo furioze saltadis, kaj minacis mortbati nin. La suben-suĉanta akvo fortiris niajn ŝuojn. En tia momento ni ne timis pri vivofino, ni simple batalis. Unu post la alia ni estis suĉitaj suben de la kirlakvoj. Ĉiufoje, kiam unu ekaperis kaj glutspiris

aeron, la alia estis subakvigita de helicaĵoj kirliĝoj.

La rivera forto portis nin preter la trian Dentegon de Nemezo al golfeto, kies kurento retrofluas per cirkla kontraŭfluo. Eta sabla delteto ĉe la golfeto allogis kiel rifuĝejo, kie rivereto enfluas. Tamen, naĝante ni devis lukti por rektigi la kanuon kaj elŝuti la akvon per potoj. Finfine ni sukcesis naĝ-grimpe eniri la kanuon kaj eligi la akvon plejparte. La kontraŭfluo puŝis nin en cirkloj unue pli proksimen al la bordo kaj poste krize proksimigis nin al la ĉefkurento, sed ĉiam reen al la bordo. Finfine ni atingis la bordon de la golfeto.

Sablo, rivereto kaj sekaj branĉoj por fajro estis vera azilo. Sed ni suferis de hipotermio – manoj preskaŭ frostigitaj, korpoj kaj vestaĵoj malsekaj de frida akvo. Mi kolektis branĉetojn kaj derompaĵojn, lignon por ekstarti fajron, dum Bari malŝarĝis la kanuon. Kiam la fajro ekflamis, Bari havis botelon da rumo enmane, sed ĝi glitfalas de liaj malvarmaj fingroj kaj rompiĝis. Estis nia lasta. Tamen, spasme turninte la botelon, li ŝparis la duonon. Necesis filtri la rumon tra mian feltan ĉapelon por eligi vitro-pecetojn. Tie ni ripozis tri tagojn en stato de ŝoko, sed ĉion sekigis. La vento trairis la kanjonon per zumsono kiel plorado. Ni nomis tiun golfeton nia 'Golfeto de Savo'.

Prepare por la venonta etapo ni grimpis laŭlonge de la alta bordo por plani. Ĉi tie la riveron Liard

strangolas krutaj rokmuroj al mallarĝa rapida fluo. Ĝi havas la timindan nomon 'La Laringo de Satano'.

En septembro, la suno ne penetris en tian kanjonon kaj ĝi estis malgaja kaj deprima. Ĉe la fino, la rivero dividiĝis ambaŭflanke de gruz-sabla insuleto. Nia mapo montris serion de torentaĵoj unuflanke, kaj aliflanke ni povis vidi ondojn krestantajn, altajn de sep ĝis naŭ futoj. La bruado de la muĝanta akvo kaj la vekriado de la vento tremigis niajn nervojn. Ni nervoze plenigis kaj fumis niajn pipojn. Niaj nervozaj urinadoj pli oftis. Tamen, ni sukcese kaj sen probleme antaŭeniris kaj tendumis apudborde sep tagojn.

La Granda Kanjono fakte estas serio de etenditaj kanjonoj kun vastigitaj basenoj inter ili, en kiuj troviĝas kutime unu insulo. Ni ne renkontis pliajn problemojn atingi la mult-kanaligitan estuaron de la rivero Bufo. Ni konstatis, ke ni certe malfruos por la rendezuo kun mia filo Evan, kiu sendube maltrankviliĝos. La vojaĝo supren laŭ la rivero Bufo certe estos teda kaj elĉerpiga pro la malprofunda akvo kaj la neceso treni la kanuon per ŝnuro. Ni komencis revii pri varmaj litoj, pri restoracia manĝaĵo, pri bifesteko kaj pri biero, kaj ĉio cetera ĉe la Buf-rivera turista gastejo.

La fluo kontraŭ ni estis forta. Necesis vadi aŭ por treni la kanuon kontraŭflue, aŭ por porti ĝin

supren preter rokoj, aŭ por trovi vojon inter la ŝtipaj obstakloj. Ofte Bari sidis en la kanuo kaj stiris ĝin, dum mi, portante longan ŝnuron alfiksiton al la pruo, supreniris sablaĵojn, rokojn kaj ŝtipojn tenante la kanuon, fraton kaj provizojn stabilaj, por progresi antaŭen sekure.

Polusa vortico komencis malsupreniri de la nordo. Frosta kaj seka vento. Ĉiutage ni devis halti je la 16-a horo pro la malvarmo. Perdinte niajn ŝuojn ĉe la Dentegoj de Nemezo, ni nun portis alk-felajn mokasenojn ene de kaŭĉukaj ŝuoj. La frostigo glaciigis la mokasenojn ĉiunokte kaj prokrastigis niajn matenajn forirojn, pro la bezono degeli ilin. La ŝtipoj kaj ŝtonoj nun estis glaciigitaj kaj ĉiun klopodon progresi renkontis faloj kaj faloj. Sentoj de pereco kaj fineco trapenetris en niajn frostigitajn fingrojn, venis el niaj sangantaj genuoj kaj alkroĉiĝis al niaj mensoj kiel malsekaj vestaĵoj.

Tamen obstine ni progresis. Sed foje falanta ŝtupo tiregis la trenŝnuron el miaj fingroj. La kanuon kaptis la rapidakvo kaj ĵetis ĝin kaj Bari-on kontraŭ ligno-amasegon. La akvo-premo suĉ-subenigis ilin al mort-malapero. Sola, mi staris riverborde, sen frato, sen kanuo.



Restis al mi la vivo, malsekaj vestaĵoj, dorsosako kun mangaĵoj, pipo, tabako kaj alumetoj.

Mi iris al apuda arbaro kaj kolektis sekajn musketojn kaj branĉetojn. Revenante al la lignoamaso, kie mia frato kaj 'Nur Mi' mortdronis, mi ekstartis fajretojn, tie kaj tie kaj ĉirkaŭe, ĝis post du tagoj fumon anstataŭigis flamoj, kiuj senĉese plivastigis la kreskantan funebran ŝtipar-incendion.

Nokte, la rivero brulis laŭ aspekto de fantome reflektitaj dancantoj sub nigra ĉielo, kies steloj kaj planedoj mesaĝis al "... la TERO, tiu tre malgranda scenejo en la vasteco de la kosma tuto, kie ĉiu homa estulo, kiu iam ajn estis, ...

plenumis sian vivon...", kaj mi atendis en frakcio de la "blua ter-planeda punkto" savon aŭ morton. Pli malpli mi memoris vortojn de Karl Sagan.

Mi travivis ses tagojn apud fajro, kies flamoj fajrigis la ĉielon kiel la bruloj de infero.

La sepan tagon mi aŭdis klakadetan bruon de helico helikoptera.

Wally du Temple



La Homo kaj Lia Mondo

Estimataj legantoj,

La kialoj por “kribri” malnovajn presaĵojn varias. Mia-kaze temis pri troo da ili : necesis liberigi spacon por la pli aktualaj.

Inter la plej malnovaj mi trovis kvinlingvan broŝuron de la “International Service – CBC Radio-Canada”. Mi ricevis ĝin de kuracisto en mia urbo en la iama Ĉeĥoslovakio (nun Ĉeĥa Respubliko), ĵus antaŭ ol mi transloĝiĝis en Kanadon, en 1972. La kuracisto modeste konfesis al mi sian partoprenon en konkurso de la menciita radiostacio, en 1966, je la temo “La homo kaj lia

mondo”,* la temo de la internacia kaj universala ekspozicio Expo 67 en Montrealo, okazinta en 1967. Mil-vorta eseo pri tiu temo estis la tasko por la konkursantoj. Mia kuracisto venkis.

Mi nostalgie relegis la anglalingvan tradukon de la eseo kaj konstatis, ke ĝi ne antikviĝis. Nun mi oferas ĝin al vi, de mi esperantigita.

Olga du Temple

* Angle “Man and his World”, france “Terre des hommes” laŭ la titolo de fama libro de Antoine de Saint-Exupéry, la aŭtoro de La Eta Princo.

*“Mi aĉetus malnovan muelejon ĉe fiŝlageto,
taŭgan por adapto al semajnfina kabano.”
Anonco en la ĵurnalo Prace, 9.8.1966*

*“Konstruo de la Kanada Banka Centro
en Toronto proksimiĝas al fino. La 56-etaĝa,
225m alta konstruaĵo estas la plej alta en mondo.”
El la ĵurnalo Prace, 9.8.1966*

SOMERO, 8-a PM

Estis somere, je la 8-a horo vespere,
kiam mi unuan fojon eksidis al tajpilo
por tajpi mil-vortan leteron
destinitan al malproksima kaj por mi ekzota lando,
naive kredante, ke tio estos facila.

Kelkaj magiaj minutoj, kiam tago noktiĝas,
julio aromata de matura frukto,
antaŭ mi blanka malplena paper-folio,
sub mia fenestro du junaj virinoj,
kaj mi – sekrete – aŭskultas ilin.
Mi aŭdas unu diri al la alia
per grava voĉo sian sekreton,
al kiu nun submetiĝas ŝia mondo :
ŝi estas en la dua monato
kaj la doktoro diris al ŝi : “Panjo, vi devas...”
Mi ne kaptis, kion tiu juna virino

kun longaj blondaj haroj nun devas fari –
ĉion kion nunaj junaj patrinoj devas fari –,
por ke la homa ido,
kies vivo estas ene de ŝi kiel blanka malplena
paper-folio,
naskiĝu sana kaj bela.
Mi ekpensas pri tio, kion ni ĉiuj devus fari
por plenigi la blankan folion kuŝantan antaŭ ĉiu el
ni
per bela rakonto pri la sana vivo,
pri nia historio.
Mi konscias, kiel konfliktaj nun estas homaj sortoj,
kial ni rifuĝas de ni mem
en la silenton de fragmitejoj kaj nimfejoj
kaj en la subliman pacon de naciaj parkoj.

Tiun vesperon
mi ne tajpis pli.



SUPRE DE LIBROJ DE PRAAJ MITOJ

Oni diras, ke unue estis ora aĝo de abundo kaj prospero sen laboro, ke tiam ĉiu estaĵo estis ludilo aŭ miraklo de dioj, ke eĉ la Lakta Vojo ekestis el la lakto ŝprucanta el la dieca brusto de Hera.


Sed la sciencistoj en la dudeka jarcento diras, ke estis male, ke neniam okazis la “aurea prima ætas”.** Ĉio, kion homo bezonis, estis atingebla nur per laboro kaj strebado. Certe neniam la homo pensis pri si mem esti reganto de la naturo. Li estis ĝia timigita subulo, ne la mastro, kaj tio dum miljaroj enpresis neforviŝeblajn spurojn, ĝis nun transportatajn de generacio al generacio, enplektitajn en kromosoman kaj genan heredaron, kodigitajn en spiraloj de DNA : seriozeco de nordanoj, temperamento de sudanoj, obstineco de la koloniistoj-ĉasistoj de Ontario kaj de la rivero Sankta-Laŭrenco, harditeco de montaranoj en Javorník.

Eĉ se homoj parolas saman lingvon, oni povas facile distingi anglon de irlandano.

Longan tempon bezonis la trovado de metodoj por superi la ĉirkaŭaĵon. Tion pruvas al ni ne nur la faktoj, sed ankaŭ ties respeguligo en arto.

Ekde la mita unua ora aĝo ĝis hodiaŭ ĉiu honesta verko rezultis el laboro. Certe pravis la klera homo, kiu diras, ke pensado dolorigas.

** Latina esprimo kun la signifo “ora unua epoko”.




*“Dum la unua duono de 1966, 17 441 homoj
aŭ mortis aŭ estis severe vunditaj
dum aŭto-akcidentoj en Ĉeĥoslovakio.”
Ĵurnalo Prace, 10.8.1966*

*“Mi vendos motorciklon Ĵaŭa 350’ en
perfekta stato. Skribu al : Mi aĉetos aŭton.”
Anonco en la ĵurnalo Prace, 10.8.1966*

MALLONGA HALTO ĈE FORMIKEJO

Ili vivas en la ĝardeno ĉe mia kabano.
Kiel viglaj kaj diligentaj,
kiel laboremaj ili estas !
Kiom multe ili kapablas konstrui per siaj kruretoj !
Ĉu eble ili servu kiel la modelo por homoj ?
Ankaŭ la homoj devas diligente labori por atingi
siajn celojn,
siajn dezirojn.
Ankaŭ mi, propramane,
konstruis ĉi tiun kabanon,
mian oazon de paco.

Sed formikoj laboras sen aspiroj,
fantazio estas nekonata de ili, kaj same ankaŭ
amo kaj sentoj.
Ili neniam konscias ĝojan kontentecon
pro bone farita laboro.
Mi staras ĉe la formikejo kaj sentas froston en la
dorso.



Invadas min timo,
ĉu iam iu mondreganto deklaras kiel modelon
ĉi tiun etan viglan insekton.
Sed samtempe mi kredas al io,
kio ekzistas nur en homoj,
kio distingas homojn de formikoj.
Kaj tio certagrade min trankviligas.

“27-jara meksikia virino, Esperanza del Valle Vagues el Meksiko, la unua virino kun artefarita koro, ekstaris la unuan fojon de sia hospitala lito en Houston, Teksaso, Usono, kie ŝi submetiĝis al la operacio.”


“Biologistoj en Sovetunio strebas savi lagon Bajkal, kiun minacos la elfluejaj akvoj de la konstruotaj uzinoj.”

“133 milionoj de tunoj da malpuraĵoj ĉiujare eskapas en la atmosferon supre de Usono. Tio estas pli ol la pezo de la ŝtalo, kiun Usono produktas dum la sama tempodaŭro.”
Detaloj el ĵurnaloj, 12.8.1966

VERTIĜO PRO SUKCESO

Mirakloj de la dudeka jarcento :
relvojoj trans kontinentoj,
56-etaĝa konstruaĵo,
supersona aviadilo, artefarita koro
kaj, kompreneble, la atombombo.
La homo ja scias regi,
sed ne ĉiam respektoplene kaj saĝe
traktas la naturon.

Mi naskiĝis en urbeto sub la montaro,
kies nomo estas Javorníky,



sed de longa tempo tie ne plu estas aceroj,
kiuj iam donis al ĉi tiu montaro la nomon.
Kiom ofte ni vidas teron sen grundo,
arbaron sen arboj, riveron sen fiŝoj aŭ eĉ sen
akvo,
urbojn en fabrikaj fumo.

Homo kapablas savi la sanon kaj vivon de aliulo
helpe de artefarita koro,
sed kapablas ankaŭ detrui la sanon de centmiloj
per industria kanceriga forfalaĵo.

Ĉu ni iam lernos mastrumi ?

“La tempo ja estas matura por granda revolucio, nepolitika, universala, tutmonda. Tiu ĉi revolucio devas esti mobilizo de homaj scioj kaj kapabloj.”
Le Courier, Parizo, Oktobro 1965

LA LASTAJ 158 VORTOJ

Denove estas la magia momento,
kiam tago noktiĝas,
denove kuŝas antaŭ mi blanka malplena paperfolio,
kaj en mia koro ankoraŭ restas tro multe da vortoj, multe pli ol mil,
kiujn mi ne kapablas esprimi.
Kaj en la koroj de milionoj el miaj gefratoj,
popolantoj de ĉi tiu planedo same kiel mi,
certe estas pli ol mil vortoj,
sonantaj malsame, sed kiuj tamen diras la samon en ĉiu lingvo de la mondo.
La vortoj lernotaj por eldiri,
por skribi ilin sur la blankan malplenan paperfolion
ankoraŭ kuŝantan antaŭ la homaro,
por registri en la spiralojn de DNA
de embriaj ĉeloj, kiujn ni vole-nevole transdonas de generacio al generacio.

Ni devus lerni paroli por kompreni
unu la alian,



"Labirinto": la plej grava filma projekto de Expo-67. Kreita de Roman Kroitor, de Nacia Filmoficejo de Kanado.

ĉar hodiaŭ, ŝajne, ne plu eblas eskapi.
Por ke unu tagon la junaj virinoj de la mondo,
estantaj en la dua monato,
ne devus demandi sin mem, ĉu preferinde
tiu sendefenda embrieto
ne naskiĝu.

La Sesa Internacia Kongreso de Esperanto

Washington, 14-21 Septembro, 1910 (British Esperantist)

(Bildoj el la Notlibro de Ĉeestinto)

– Ĝis revido en Washington!

Tiel mi parolis, kun serena optimismo, kiam mi lastan jaron adiaŭis en Barcelono Usonan samideanon... kaj poste en la daŭro preskaŭ de tuta jaro restis nescianta, ĉu jes aŭ ne mia espero plenumiĝos.

Sed mi havadis fidon...

Kaj jen, fine, la sorto – dank' al multe ŝatita kunhelpado de kelkaj britaj samideanoj! – sin montras bravegulo. Montriĝis, ke estos mia dolĉa revo, vojaĝi Amerikon al vi. Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondo. Ni, filoj de la malnova kaj maljuna kontinento, venis al vi kiel gastoj; sed ne vidanta turisma enŝipigis nin, ne la espero de la komerca akiro pelis nin al via bordo, ni venis al vi, por alporti al vi novan senton kaj novan ideon, ni venis, por alporti novan kuraĝon al tiuj niaj samideanoj kaj samidealanoj, kiuj ĝis nun laboris inter vi kaj kies vortoj pri la nova popolo eble ŝajnis al vi tro fabelaj. Peco de tiu miksedevena kaj tamen lingve kaj kore unuigita popolo nun staras antaŭ vi reale kaj vivante. Rigardu sian, anskultu nin, kaj kovrinkiĝu, ke ni ne estas fabelo. Ni estas divergentanoj, kaj tamen ni sentas nin kiel samgentanoj, ĉar ni

Min revenintan post la Kongreso al Londono akceptas avida demandaro de amikoj:

– Ha, jen vi denove? Kiel vi fartas? Ĉu vi feliĉan

vojaĝon havis? Ĉu la Kongreso estis sukcesego? Ĉu vi marmalsaniĝis? Ĉu vi vidis la ĉielskrapilojn? Ĉu


Niagara ankoraŭ fluas? Kion vi opinias pri Ameriko? Kion–

– Nu, mia kara, atendetu kun via pluvo da ĉu kaj kiel kaj kio, kaj vi ĉion aŭdos! Mi ne povas la tuton diri per unu spiro! Kaj restas ja en mia kapo tiom da impresoj, ke nefacile estas elekti, per kiuj el ili komenci. Ni tamen provu!..

Kaj post unu kvaronhora periodo de po-demanda elĉerpado por unu amiko, kaj dua eldono samdemanda por dua amiko, kaj tria ekstra-ekstrakto por tria:

– Nu, sufiĉe! Jen vi havis almenaŭ ekvidon sur la

kongresaj travivaĵoj. Nun vi devas pacience elteni ĝis aperos Oktobra British Esperantist. Tie vi povos



esplori la tutan galerion de l' Washington'aj bildoj laŭ via plaĉo...

Jen la unua:

**Sur la V.Ŝ. "George Washington,"
Merkredon, 3an de Aŭgusto, vespere.**

Kiel rapide pasis ĉi tiu unua tago! Kiom tamen da agrablaj momentoj oni travivis! Kaj kiel klare ĉiu okazeto restas en mia memoro! La frua leviĝo kaj manĝeto en Hampstead, la blua matena ĉielo kun ĝia promeso pri bona tago, la entubiĝo por Waterloo, la renkontiĝo en la lifto kun stelportanta samideano, kiu afable kaptas unu el miaj neniel malpezaj valizoj, la areto de amikoj apud la jam atendanta speciala vagonaro. Jen S-ro Abiko el Tokio parolanta kun kelkaj samlandanoj siaj, jen la ŝercopreta Harrison Hill, jen F-ino Lawrence, F-ino Schafer, kolego Millidge, kaj aliaj, ĉiuj ĝojaj pri la penso, ke ili baldaŭ vidos la karan Majstron sur la "George Washington," kaj povos saluti lin antaŭ ol li forveturos kun la aliaj feliĉuloj Novjorkon. Ĉeestas ankaŭ D-ro Pollen, kaj kun li, kompreneble! la fama multe vojaĝ-inta kaj -onta verda standardo, por kiu veturado trans la Atlantiko estas nura bagatelo... Envagoniĝu! krias la kondukto, kaj dum ni ĉiuj elrigardas tra la vagonaj fenestroj, alkuras lastamomente S-ro Stead por diri bonvojaĝon kaj transdonigi saluton al la Majstro. Li ankaŭ alportas la sciigon, ke S-ro

Will Thorne hodiaŭ demandos publike en la Parlamentejo en Westminster, ĉu estas vere, ke la Brita Registaro ricevis de la Usona Ambasadoro inviton sendi delegiton al la Sesa. (Iliaj Registraraj Moŝtoj ja ricevis, sed ne sendis!)

Sed jen ni moviĝas – kaj baldaŭ, sub la influo de la mallaŭta rulbruado de la vagonaro, la vidado de la preterflirtanta pejzaĝo, kaj agema fantazio, nin ekkaptas tiu agrabla entuziasmo kaj sorĉiteco, kiun konas ĉiu kongresen vojaĝanto. Nia gajeco fariĝas ankoraŭ pli granda, kiam S-ro Abiko afable diras al ni japanan propagandan paroladon pri Esperanto. Multajn interesajn aferojn li rakontas al ni pri sia malproksima lando, oni babiladas, ŝercas – kaj jen ni estas jam en Southampton!

Sekvas la kutima ekscitiĝeto pri la pakaĵoj, kiomeco de trinkmonoj, ktp, kaj post kelkaj minutoj ni estas instalitaj kun la ceteraj pasaĝeroj kaj amikoj sur la servoŝipeto, sur kiu ni faros la kelkmejlan vojaĝeton al la "George Washington," jam renkonte al ni rapidantan el la sudo trans la bele dancantaj ondoj de Southampton Water. Ŝipo estas ĉiam tre taŭga propagandejo, kaj kompreneble nia bando da fervoruloj ne preterlasas la okazon! Dume la maŝinoj bone laboras, la hela sunlumata marpejzaĝo rapide preterglitas kun siaj por ne-maristoj ĉiam tiel interesaj vidaĵoj, kaj baldaŭ ekhaltiĝo kaj sirena

ekfajfego montras, ke nia ŝipo proksimiĝas al sia celo. Jen antaŭ ni leviĝas el la akvo la imponanta formo de granda transatlantikulo, kontraste kun kies giganta maso nia servoŝipeto ŝajnas infana ludilo. Vico super vico altiĝas ĝiaj ferdekoj, amase borderitaj de la multaj pasaĝeroj, kiuj enŝipiĝis jam en Germanujo. Ankoraŭ ne albordiĝinte ni aŭdas de iu tie supre en la aero laŭtan Vivu Esperanto! kaj vidas la konatan flagon. Avide ni rigardas kaj vigle resalutas.

– Jen la Majstro! Ekkrias unu, kaj ni baldaŭ povas klare distingi konatajn vizaĝojn: D-ron kaj S-inon Zamenhof, D-ron Mybs, D-ron Arnhold, S-ron Winkelmann, kaj apud ili aliajn, anglajn samideanojn el Portsmouth, Southampton, Plymouth, kiuj profitis sian pliproksimecon por alveni plifruue. Eksonas salute “La Espero.” La entuziasmo de nia samideana renkontiĝo videble interesas la ne-Esperantistojn, kiuj de ĉiuflanke alrigardas.

Hura! fine alfiksiĝas la pasponteto, rapide ni portigas kajuten niajn valizojn, kaj iras supren por partopreni en la ekkongreseto, kiu okazas sur la ferdeko ĉirkaŭ la Majstro. Feliĉaj momentoj! kiam oni – eble por la unua fojo — vidas la karan personon de tiu homo, kiu tiel takte kaj pacience gvidadas nian aferon tra tiom da nefacilaj lokoj... Eble homoj de seka temperamento iom miras pri

la entuziasmo kaj amo, kiun vekas ĉe la ordinara Esperantisto la nomo de Zamenhof; sed ĉu mirinde estas, kiam oni pensas pri la feliĉaj spertoj, la koraj kamaradiĝoj, la plivastiĝoj de spirito, kiujn oni ŝuldas al la kara lingvo, ke la Esperantistaro ĉiulande honoras kaj respektas ĝian elpensinton, tiom pli kiam ĉi tiu estas homo tiel bonkora kaj senafekte modesta, kiel la Doktoro?

Sed – la tempo kaj la tajdo neniun atendas, diras angla proverbo, kaj senkompata sonorado anoncas, ke la nepasaĝeroj devas nun forlasi la ŝipon. Adiaŭ ! Gis revido en Antverpeno ! oni sin konsolas — kaj post tri- kvar minutoj, ni feliĉuloj vojaĝontaj Amerikon rigardas malsupren al la jam debordiĝanta servoŝipeto. Ĉe ĝia malantaŭa parto kolektiĝis – iom malĝoja pro la disiĝo — la areto da gesamideanoj, kiuj venis forsaluti nin. Sed ili tuj regajiĝas, kiam S-ro Harrison Hill—sentante ke por Esperantistoj, ĉiukore kaj ĉiulande kunigitaj per la interna ideo de la Esperantismo, efektive disiĝoj ne ekzistas – per forta voĉo ekkantas kun ili “La Espero.” En tiu sento ni rigardas ilin iom post iom malaperi, ankoraŭ per manoj kaj tukoj ilin adiaŭante.

Kaj tiun scenon ni lasu kiel lastan bildon de nia unua tago : Tiuj reportataj hejmen kantante “La Espero,” kaj ni kun la koroj turnitaj al la vasta

Okcidento, veturante Amerikon sur tiu grandega ŝipo, kiu per sia rapida kaj potenca antaŭenirado bone taŭgas kiel simbolo por la nehaltigebla progresado de Esperanto...

Sur la Atlantika Oceano, Mardon , 9-an de Aŭgusto.

Jam ses tagojn sur la maro!

Ses feliĉajn tagojn, ĉar sur ĉi tiu grandega ŝipo (27.000 tunoj) oni rapide kutimiĝas al la marmovado. Nur en la du unuaj tagoj mi sentis ian neagrablan ĝenon kaj pezecon, sed poste mi povis ĝui la bonegan freŝan maraeron kaj la ŝipan vivadon en plena ĝojo.

Kaj la vivo sur la ŝipo estas efektive tre interesa. La mirinda kaj detala organizado de la ŝipaferoj, la tiel diverstipaj kaj diversgentaj pasaĝeroj, la ĉiam ŝanĝiĝanta aspekto de la vasta ĉirkaŭanta maro, la regula sed tute ne teda ĉiutaga rutino, ĉio ĉi tio donas al la nehardita vojaĝanto tiom da novaj kaj agrablaj impresoj, ke kvankam ni estas sur la oceano jam de unu semajno, ŝajnas al mi ke apenaŭ hieraŭ ni vokis adiaŭ al la samideanoj, kiuj venis premi la manon al la Majstro en Southampton.

Nia Esperantista kompanieto ĉi tie formas ja veran rondeton familian. Ni estas entute deksepe: D-ro

Zamenhof kaj lia edzino (ambaŭ, vi ĝojos aŭdi, en tute bona farto kaj gaja humoro), D-ro Mybs, D-ro Arnhold, kaj S-ro Sergius Winkelmann el Germanujo, S-ino Essigmann el Varsovio, delegitino por Polujo, S-ino Tiard, F-ino Martin kaj S-ro Chauveau el Francujo, S-ro Gottschall el Aŭstrio, S-ino Theodore el Kimrujo, F-inoj Hutchinson, Thomson kaj Higgs el la Londona Klubo, Kolonelo Pollen (kaj la flago!), S-ro Richard Sharpe el Torquay, kaj mi mem.

Granda transatlantikulo kia la "George Washington" estas ja mirindaĵo! La pasaĝeroj estas sufiĉe-nombraj por mem formi urbeton. Estas 430 unuaklasaj, 420 duaklasaj kaj preskaŭ 300 triaklasaj kaj plue 900 elmigrantoj, en la kvara klaso. Aldonu ankoraŭ kelkcent por la maristaro, kaj oni vidas, ke kunvojaĝas sur tiu ŝipo preskaŭ 3,000 homoj!

Vi povas prezenti al vi, kian sisteman organizadon kaj rutinon postulas la komforta loĝigado, nutrado kaj distrado de tia amaso. Sub la kompleza gvidado de la ĉefservisto nia Esperantistareto faris "ekskurson" de inspektado. Unue, la kuirejon, kun siaj miloj da vazoj, siaj zorge dismetitaj fakoj: bakejo, lavejo, ktp. Ĉio estas aranĝita plej kompakte kaj praktike. Oni eĉ havas aŭtomatajn ovkuirilojn, kiuj varmigas la ovojn laŭ tri gradoj de manĝdeziro: molaj, meze firmaj, kaj firmaj!

Malsupren ni alvenis en la tenejo, kie oni konservadas la manĝaĵojn freŝaj dum la tuta vojaĝo. Tra dikega kvazaŭkofra pordo oni penetras en glacian temperaturon, kaj vidas la neklarajn formojn de grandaj viandopecoj pendantaj de la plafono. (Tiu vizito ja multe vundis miajn vegetaranajn okulojn kaj nazon, sed min revivigis la fruktejo!) Poste, ankoraŭ malsupren laŭ aliaj kolompaj kaj glitigaj metalaj ŝtuparoj, ĝis la maŝinejo, kie senĉese funkcias tage kaj nokte potencaj cilindroj kaj radoj, por nin portadi sekure kaj certe antaŭen po rapideco de 20 mejloj en horo. En tiu submondo laboras ja por nia komforto tuta regimento da homoj...

Ekskursante pluen en la trian klason, ni havis la plezuratan surprizon, trovi S-ron Henry, membron de la Varieta Ligo Esperantista. Tie nia vojaĝeto devis fini, ĉar en la kvaran klason, pro emigraciaj leĝoj, oni ne permesas aliklasanojn eniri.

Bildojn pri la luksa aranĝo de la kajutoj, salonoj, manĝohaloj, lumĉambroj, k.t.p. sur tiaj transmaraj ŝipegoj, ĉiu povas vidi en la prospekto de kiu ajn vojaĝkompanio. La prospektoj ne trograndigas. Sidante vespere en la belega unuaklasa koncertsalono, sur karesemola kanapo, kaj aŭskultante la dolĉan muzikon de iu granda virtuozo fidele reproduktatan de la elektra piano, oni efektive malfacile kredas, ke ĉie ĉirkaŭe estas

la vastega maro, ondanta en senĉesa maltrankvileco. Se oni volas legi aŭ skribi, ekzistas tre eleganta saloneto kun ĉio necesa, kaj eĉ speciala ĉambreto, kie oni povas senpage uzi skribmaŝinon.

Ankaŭ por sin distri ne mankas rimedoj. Ĉiuvespere la ŝipa orkestro (konsistanta el la kelneroj kaj kuiristoj, kiuj vin servis dum la tago) ludas en diversaj partoj de la ŝipo. Unu vesperon estis danco, en kiu mi vane provis venki la malfacilaĵojn de la Amerikaj “du-paŝo” kaj “valso.” Por la pli atletaj (en la unua klaso!) troviĝas, sur la plej supra ferdeko, elektre funkcianta gimnastikejo, kun ĉiaj plej lastaj aparatoj, de selo kiu vin sidskuas kiel kamelo, ĝis masaĝiloj kiuj vin frapetas aŭ frapegas laŭ plaĉo. Apude, sur larĝa sunferdeko, vi povas ludi ringoĵetadon aŭ ŝovbilon. Kiam vi laciĝas pri tio, vi povas vigle marŝadi sur la bonegaj promenejaj ferdekoj, kaj fine vin sterni sur ferdeka kuŝoseĝo (unu dolaron por la vojaĝo!) kaj rigardadi la maron en dolĉa revado, ĝis la ĉiam plezuriga sono de la manĝosonorilo vin logas volontegan al la tablo — por fari pluan lertan vegetaranan kombinaĵon el nevegetarana menuo!...

Malgraŭ nia rilate malgranda nombro, ni Esperantistoj faris tre multe da propagando sur la ŝipo. D-ro Mybs kaj Kolonelo Pollen faris tre

interesajn paroladojn en germana kaj angla lingvo en la unua- kaj duklasaj salonoj, ni presigis specialajn propagandajn artikoletojn en la ŝipgazeto (ekzistas ja speciala presejo por tio kaj la menuoj, k.t.p.), kaj la bonege flagornamita Zamenhofa tablo en la manĝosalono servis kiel ĉiama rememorigilo por la diversnacia gastaro. Ankaŭ inter la multaj novaj amikoj, kiujn oni ĉiam faras sur ŝipo, oni vekis multe da intereso pri nia lingvo, kaj eĉ donis komencajn lecionojn. Ĉe la librovendejo — kie vi povis aĉeti ĉiaspecajn gazetojn kaj revuojn — oni elmetis Esperantajn lernolibrojn, kaj promesis mendi pluajn provizojn. Tiel per nia vojaĝo ĵetiĝis multe da Esperanta semo. El ĝi kresku bona frukto! Ŝipo estas ja ideala propagandejo. Baldaŭ, tamen, ni devos ĝin forlasi. Jam morgaŭ, oni diras, ni atingos Novjorkon.

Novjorko, vendredon, la 12an.

Efektive, Novjorko estas interesa urbo. Sed ni estas ĉi tie nur de merkredo, kaj jam morgaŭ ni devos foriri. Du tagoj apenaŭ por elĉerpi ĉion vidindan kaj vizitindan en urbego kia Novjorko! Sed mi kredas, ke mi bonege utiligis la mallongan tempon, kiun mi disponis. Almenaŭ mi forportos multegon da novaj impresoj, agrablaj kaj malagrablaj.

La unua impresio estis tute agrabla, kiam sub helblua ĉielo ni sur la "George Washington" proksimiĝis al la haveno kaj vidis klare la grandegajn multetaĝajn konstruaĵojn, en kiujn la Novjorkanoj sisteme koncentrigas sian komercan vivon. Kontraŭ ili la fama statuo de la Libereco, kiu staras kun levita torĉo apud la enirejo, ŝajnas iel negranda kaj senpotenca. En imponanta aro ili staras tie, mirigaj simboloj de homa progresado kaj aspirado. Dum ni iom post iom alvenas, en ĉiujn direktojn trans la vasta haveno diligente rapidas ĉiuspecaj ŝipoj, vaporpramegoj, boatoj, blekante kaj fajfante en senlaca kaj nepriskribebla okupateco.

Bedaŭrinde tiun vivoplenan scenon ni devis baldaŭ forlasi, por preni nian lokon en unu el la longaj vicoj da personoj, kiuj atendas malsupre en la manĝohalo ĝis la emigraciaj oficistoj kontrolos iliajn vojaĝpaperojn. La afero estas io pli, ol simpla formalizaĵo. Ni jam estis skribintaj sur nia bilet-dokumento respondojn al multafera demandaro: kio estas nia profesio, ĉu ni estas anarĥistoj, bigamistoj, kio estas nia celo en Usono, kie kaj kiom da tempo ni restos, k.t.p., kaj nun ni devis buŝe respondi diversajn pluajn demandojn. Laŭ malbona ŝanco nia oficisto (por pasaĝeroj, kies nomoj komenciĝis kun la litero M) ŝajnis esti la plej malrapida el ĉiuj. Ni do devis longaĉe atendi,

kaj el la interesaj epizodoj de la endokiĝo spertis nur la sonojn kaj kriojn, kiuj eniris tra la fenestro. Mi ja domaĝis la tempon, kaj mi demandas al mi, ĉu la registaro ne povus eble pere de la ĉefservisto sur la ŝipo – pli oportune kaj rapide aranĝi tiun ceremonion.

Fine estis finita, kaj ni estis liberaj elŝipiĝi. Sur la kajo nin atendis kelke da Novjorkaj gesamideanoj, inter aliaj S-ro Silbernik, bofrato de la Majstro. Per ilia afabla helpo plisimpliĝis por la ne-angloj la pakaĵdeklaro ĉe la dogano, kiu ja, laŭ tio, kion ni vidis apude, por multe da multon aĉetintaj Amerikaninoj devas esti afero sufiĉe elspeziga.

La plejmulto de la Eŭropaj samideanoj sin instalas, por sia restado en Novjorko, en la Herald-square Hotelo, centre lokita apud la fama Broadway. Ĉar tie loĝis ankaŭ D-ro kaj S-ino Zamenhof, la hotelo servis kiel oportuna kunvenejo por babilado kaj deirejo por vizitoj tra la urbo. Por ni Eŭropanoj la Usona hotela vivo estis multmaniere nova: la granda enireja halo kun la ledaj brakseĝoj, kie ĉiuhore sidas interparolante aŭ fumante la gastoj, la vico da ĉiampretaj negroj, konstante diskurante por tiu aŭ alia servo, la oftaj elvokoj de la telefonistino ĉe sia komutatoro speciale instalita en la halo mem, la gazet- kaj poŝtkart-vendejo — tio ŝajnis interesa. Kiel fidelaj malnovmondanoj, kelkaj el ni loĝis “laŭ la Eŭropa metodo,” t.e. ni

manĝis laŭ nia plaĉo ekster la hotelo. Por aparta ĉambro sola oni devis pagi du aŭ pli dolarojn por tago, aŭ du povis dividi ĉambron por kuna pago de tri aŭ pli dolaroj. Por la manĝoj, oni povis viziti la tre oportunajn kaj bonege organizitajn restoraciojn “Child,” iom similaj al tiuj de “Lyons” en Londono, sed pli rapidemaj kaj vivoplenaj laŭ la intensa Novjorka maniero, kaj — ŝajnis al mi — pli vigle kaj facile funkciantaj.

Pri ĉio, kion mi vidis, mi ne havas lokon ĉi tie paroli, sed devos kontentiĝi je prezento de nur kelkaj impresoj. Kio min unue frapis kaj agrable, tio estis la varmeco de la vetero, kaj la ĉiea klareco de la atmosfero, kiu devenas, mi supozas, de la fakto, ke oni en Novjorko hejtas per malmola karbo. Kiam do mi ian matenon pagis unu dolaron kaj supreniris per “ekspresa” elevatoro (oni ja havis, krom tiaj, “lokajn” kaj “mezajn”) ĝis la pinto de la 48-etaĝa “Singer” turego, mi povis ĝui mirindan elvidon sur la tuta vasta urbo sternita kiel mapo antaŭ miaj okuloj. Tiu konstruaĵego estas alta pli ol 580 futojn (pli ol la duono de la Eiffel-turo en Parizo), kaj staras en la suda kvartalo, ĉirkaŭate de pluaj gigantoj de dudek ĝis tridek etaĝaj, ĉiuj tiel same pelataj ĉielen de la mallarĝeco de la insulo kaj la pli kaj pli kreskanta komercista bezono pri centre lokitaj oficejoj, kaj en la nordo de la urbo elstaras la “Metropolitan

Building,” pli alta eĉ ol la “Singer.” Rigardante el tiu altega observejo, sur tiun vastan labirinton de intensa kaj konstanta laborado, aŭdante la agrable miksitajn sonaron de ĉiuspecaj okupoj, kiu ĉiuflanke el ĝi leviĝas, spirante la tiel freŝan tiean aeron, kaj vidante la senĉese moviĝantan procesion de hometoj, kiuj kvazaŭ formikoj tie malsupre svarmas, svarmas, svarmas kun mil diversaj celoj laŭ la longaj rektaj stratoj, oni ne povas ne eksenti ian strangan entuziasmon kaj fierecon pri la mirindaj faroj, kiujn tie plenumis la progreso de l’ homaro. Mi momente forgesis la multajn sociajn malbonojn, kiun kaŝis tiu bela eksteraĵo: mi vidis nur la alrapidantajn ŝipegojn, kiuj portas vendotaĵojn el ĉiuj partoj de la tero, la imponantajn magazenojn, kie paradas kun ĉia cirkonstanco de lukso la plej elspezema riĉularo en la mondo, la mirinde organizitajn oficejojn de mondfamaj firmaoj, kaj la tuto brilis antaŭ mia vigligita fantazio kiel mirinda simboleco de homa kapableco...

Vespera Novjorko.

Vespere, kiam mi vagadis en la ĉiama fluo de l’ promenantoj sur Broadway, tiu sama sento estis ankoraŭ forta en mi. Kaj ĉio — la ĝenerala gajeco kaj “vivemeco,” la brilantaj fenestroj de l’ butikoj, la strata bruado, la lumoj, la ŝanĝiĝantaj elektraj

anoncoj helpis ankoraŭ tiun humoron plifortigi. Unu luman “afiŝon” mi vidis, kiu ja estis ĉefverko en tiu arto. Klare videbla de Broadway, ĝi diverskolorigis figuris roman ĉaron tiratan de du galopantaj ĉevaloj, kiun sekvis sur la areno dua ĉaro. En la fono lerte aranĝita lumaro aspektis kvazaŭ amfiteatro kun la alrigardanta popolamaso. La tuto estis farita el multege da elektraj globetoj. Oni vidis eĉ la polvon ŝprucigatan, kiam la lumaj hufoj de l’ ĉevaloj kvazaŭ frapis la teron. Kaj ĉiam, revenante al la hotelo, oni vidis tiujn senĉese galopantajn parojn, denovan emblemon de l’ homa antaŭenirado...

Tiuj elektraj anoncoj estas la plej karakteriza trajto de vespera Novjorko, kiu ja pro tio pli meritas la nomon “lumurbo,” ol Parizo mem. Por pli bone ĝui la spektaklon, mi supreniris la dekkelke da etaĝoj ĝis la tegmenta ĝardeno de la luksa Astor Hotelo. Tie, promenante inter la beletaj florbedoj kaj la murmuranta plaŭdado de diverslumigitaj fontanoj kaj akvogrotoj, aŭskultante la orkestron, kiu en nesto de palmoj ludas al ĝojanta festenanaro, oni sin kredus en ia fepalaco el la Mil kaj Unu Noktoj. La tutan vastan masivon de la hotelo borderas teraso, el kiu kvazaŭ de abrupta krutaĵo oni povas malsupren kaj ĉirkaŭen rigardi al la unika pejzaĝo, kiun formas la apudaj domegoj, kvazaŭ gigantaj nigraj rokoj banate en lumo. De

apuda ŝtala skeleto de ia konstruata nova hotelo venadas la diligenta bruo de marteloj kaj leviloj. Kaj, post tiu angulo de masonaĵo, se ni povus travidi, senlace galopadas tiuj lumaj ĉevaloj de l' progreso...

Ĵaŭdon matenon, reveninte de la vizito al la Singer turego, mi trovis D-ron kaj S-inon Zamenhof, kun D-roj Arnhold kaj Mybs kaj S-ro Winkelmann, instalatan en granda aŭtomobilo, kiun afable pruntedonis Kapitano Emerson, amiko de Kolonelo Pollen. Laŭ bonŝanco, loko estas farebla apud la "ŝoforo," kaj baldaŭ ni gaje glitas laŭ Fifth Avenue, preter la kvazaŭ-palacoj, kiujn la milionuloj en elspezema konkurado tie por si konstruigis. Ni veturis tra la fama Centra Parko, vasta kaj bele aranĝita promenejo de ĝardenoj kaj arbaretoj, kie antaŭe ekzistis nur senkultura kaj malĉarma deŝutejo por cindraĵoj kaj forĵetaĵoj.

De tie ni eliris al Riverside, la bela promenejo, kiu iras laŭ la bordoj de la Hudson. Poste ni vizitis la faman maŭzoleon de Generalo Grant, tre simila laŭ aranĝo al la tombejo de Napoleono en Les Invalides, Parizo. Ĝi estas impresive lokita sur altaĵeto apud la larĝa rivero, kies kontraŭa bordo, kun siaj arbokovritaj krutaĵoj, prezentas pejzaĝon ne malpli belan ol tiu de multaj admirataj lokoj sur la Rhein. Nia kompanieto ankaŭ havis la plezuron, alkondukite de beleta privata servoŝipeto, viziti la

vaporjaĥton "Margaret" de Kapitano Emerson. "Si" jam vojaĝis multajn milojn da mejloj — estis sur ŝi en Singapore lastan jaron, ke Kolonelo Pollen konatiĝis kun ŝia posedanto — kaj efektive tre agrable devas esti, juĝante laŭ la komforta kaj praktika instalaĵo, fari vojaĝon en tia jaĥto. Ĉe tiu viziteto montriĝis iom da lingva malfacileco, ĉar nia gastiganto, parolante nur sian gepatran lingvon, devis komprenigi sin per tradukigo. Sed estis bona okazo por D-ro Mybs diligente ekzercadi sin pri la angla lingvo! Sidante sur la ferdeko de la jaĥto, oni havis pluan impreson pri la riĉeco de Novjorko, kiam oni rigardis longan serion da multetaĝaj apartamentejoj, kies belstilaj fasadoj ornamas la tutan riverbordon. Ĉambraro en tiuj luksulejoj estas apenaŭ luebla po malpli ol 1,000 dolaroj por jaro.

Sed alian aspekton de Novjorko mi vidis, kiam kun la "Gemajstroj," laŭ afabla invito de S-ro Silbernik, mi travizitis en "taksi" la orientan kvartalon, la "malriĉulejon" kie loĝas la fremdula parto de la urbego. Kia svarmejo! Kiel pitoreskaj estas la stratoj kun siaj budaj vendejoj, siaj butikoj kun la kuriozaj surskriboj en hebrea lingvo, la intimaj familiaj grupoj ĉe la fenestroj, la infanoj kiuj en ĉiaj gradoj de vesta negliĝo ludas kaj baraktas sur la stratoj! Oni kredus esti en ia urbo en la varma Sudeŭropo. La popolamaso estis tiel densa, ke,

malgraŭ la ĉiumomenta blekado de la avertilo, la aŭtomobilo nepre devis veturi laŭ piedira malrapideco. Kaj la vojoj -- en kia malbona stato ili estis! Ĉiun duan aŭ trian metron nia veturilo profundigis duonfuton en ia truon, aŭ devis eviti ian amason da rubaĵoj. Kaj efektive, la duono de la vojoj en Novjorko ŝajnis obstrukcataj de riparaj laboroj. Sed malgraŭ la ĝenerala nelukseco, la bonhumoraj vizaĝoj de la popolanoj montris, ke ne mankas tie gajeco kaj vivoĝojo, kaj la duonnudaj bubetoj sur la strato ĉirkaŭsaltetis kaj petoladis en plej bela feliĉegeco. Vera paradizo por artisto!...

Poste, trans- kaj reen-veturinte sur la grandega Williamsburgh pendponto, ni iris al la fama hebrea kafejo "Lorbeer" por vespermanĝi en tute deca konformeco kun lokaj kutimoj kaj kondiĉoj.

Mia vespero — efektiva kalejdoskopo da impresoj! — finiĝis per vizito al Coney Island, la granda foiro kaj ludejo, kie Novjorko sin distradas dum la varma duono de la jaro. S-ro Stock, Novjorka samideano, afable min akompanis kaj montris la ĉefajn vidindaĵojn. Estis ja vidinda kiel karakteriza fazo de la urba vivo, sed mi ne povis ne senti iom da bedaŭro, ke urbo tiel imponanta kiel Novjorko, ne povis krei por siaj popolanoj distraĵaron malpli krudan, pli klerigan, ol tiuj, kiujn ni vidis en tiu vasta brilaĉa amuzejo... Estis

preskaŭ la unua matene kiam mi revenis Novjorkon kun duone dormanta plenvagono da amuziĝintoj, en la elektra ekspreso.

Individualismo aŭ la Socio?

El ĉio ĉi tio, kaj el tio, kion mi vidis en la Orienta Kvartalo kaj aliloke, kreskis pensaro, kiu multe modifis mian unuan impreson pri la brilanta progreseco de Novjorko. Mi komencis demandi al mi, ĉu tiu mirinda grandeco de rezultatoj, kiun oni ĉiuflanke vidas, estas efektive tiel eminenta kaj priĝojinda, kiel ĝi ŝajnas? Ke ekzistas en la Usona vivado la potenca fortego, kiu nehaltigeble instigas kaj puŝadas la homojn al senĉesa penado kaj atingado, neniu ja povas dubi; sed ĉu tiu fortego estas konscie direktata kaj uzata al altaj celoj kaj por la komuna bono? Tie, ŝajnas al mi, estas la malforta punkto de la Usona socio, kia mi ĝin ekvidis; la ioma manko de komuna agado por komuna socia idealo, kvazaŭ la "civitana" sento, malgraŭ la demokrateco de la Usonanoj, iel ne estas ankoraŭ forta kaj mem-konscia. Ĉie oni vidas mirindaĵojn de arĥitekturo, de organizado; sed la plejmulto estas por la profito de iu areto da individuoj, por la privata ĝuo de iu aparta kompanio aŭ asocio.

La konstruaĵegoj, kiuj tiel mirigas la vizitanton, ne estas la publikaj urbaj administraciejoj, sed nur la produkto de ia privata komerca aŭ industria

iniciativo. Ŝajnas al mi, ke oni ĉi tie ne sufiĉe respektas la civiton kiel la komunan templon de la socio; ja la ofta uzado de la vorto "graft" (fiprofito) montras, ke multaj opinias la civiton io ekspluatinda. La plejmulto estas tiel okupegata pri siaj propraj personaj aferoj, ke ili ne havas tempon por sin okupi pri komunaj publikaj celoj. En la ĉiutagaj ĵurnaloj oni aŭdas la saman noton. Ĉio estas persona, ĉiam la individuo adorata kaj kreskeganta laŭ sia propra dolĉa volo. Tamen, tio estas eble nur trajto neevitebla ĉe la junaĝa vivado de socio sensimile miksdevena kaj heterogena, kiu iam, kiam ĝiaj diversaj elementoj interasimiliĝos, preskaŭ certe fariĝos popolego tia, kian la mondo ankoraŭ ne vidis. Al la venonta ŝanĝo montras jam la kreskanta ĝeno kaj nekontenteco, kiun nuntempe eksentas la popolo, kontraŭ tiuj akaparemaj floregoj de individua libereco: la trustoj. Kaj la Centra Parko kaj diversaj grandiozaj muzeoj kaj kolegioj atestas, ke publika kunsento ne tute mankas. Dume, la torĉon portanta statueto en la haveno ŝajnas al mi simboli, almenaŭ en Novjorko, ne tiom justan liberecon, kiom individualismon in excelsis.

Sed mi tro filozofias! Restas ankoraŭ priskribota la Kongreso. Pardonu, kara legantaro, mian eble tro longan kaj sekan sociologian ekskurson. Morgaŭ mi vin kondukos al Washington... Eble tie, en

ĉefurbo, kiun naskis kaj kreskigis ne aparta individualismo, sed ŝtatara kunlaboremeco, ni ricevos impresojn de alia speco. Sed antaŭ ol diri adiaŭ al Novjorko, ni ne forgesu danki tutkore la samideanojn, S-rojn Silbernik, Stock, Klein, Reich, Kirkham kaj aliajn, kiuj tiel afable bonvenigis kaj helpis nin dum nia tre agrabla restado en la urbo.

**Arlington Hotel, Washington,
Dimanĉon, la 14an de Aŭgusto.**

ZAMENHOF ALVENAS.

**Yarmega Akcepto al la Eltrovinto
de Esperanto.**

BONVENON AL *KONGRESURBO.

**Agrable Impresita de la Chiea Libereco
kaj Vigleco Usona.**

INTENSA VIVO LIN MIRIGAS.

**Esperas Multon de la Disvastighado de "la
Kara Lingvo" en Nia Vastega Lando.**

Tiel, per kolontitolaro karakterize Usona, la agema Washington Evening Star anoncis en Esperanto la alvenon hieraŭ de D-ro Zamenhof kaj nia

kompanieto el Novjorko. La unua ĉapitro de la Kongreso malfermiĝis.

Elvagoniĝinte en la tre bela stacidomo en Washington, post tre agrabla veturado tra interesa arboriĉa pejzago kaj laŭ la bordo de Chesapeake Bay, ni trovis grandan amason kunvenintan por krei bonvenon al la Majstro kaj la Eŭropaj delegitoj. Vivu Zamenhof! Vivu Esperanto! tuj laŭtiĝis je ĉiu flanko, la kongresanoj (kun la helpo de la Esperantistaj policianoj) sin aranĝis por lasi inter si irejon, kaj tra kiu kvazaŭ triumfa vojo paŝis, modestulo kiel ĉiam, la Majstro, inter la ama kaj entuziasma akklamado de samideanoj el ĉiuj partoj de la mondo. Lin akceptis kaj eskortis D-ro Yemans, kiel vicprezidanto de la Usona Asocio Esperantista, Kapitano Perogordo el Hispanujo, por la vicprezidinto de la Kvina Kongreso, D-ro Mybs el Hamburg, efektiva prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, S-ro Chavet el Parizo, sekretario de la Centra Oficejo, S-ro Edwin Reed, sekretario de la Sesa Kongreso, kaj D-rino Ivy Kellerman-Reed, el la Organiza Komitato.

Veturigate per nerekta vojo al la “Akceptejo” en la Arlington Hotelo, la alvenintoj povis ekvidi, kiel bela estas la ĉefurbo. La fama Kapitolo, la granda Trezorejo, la multaj grandiozaj muzeoj kaj oficejoj, estas efektive publikaj monumentoj tute indaj je

la granda lando, kiujn ili reprezentas.

La Akceptejo estas tre opportune lokita en la Arlington Hotelo, malnova kaj iom post iom kreskinta konstruaĵego apud unu el la tre agrablaj publikaj ĝarden-parkoj, kiuj abundas en Washington. Multaj el la kongresanoj – inter ili D-ro kaj S-ino Zamenhof kaj la pligranda parto de la alilandaj samideanoj – loĝas en la hotelo, kiu pro sia granda enira halo kaj siaj diversaj akcepto-ĉambroj tute bone taŭgas por centra kunveno. Eĉ la Agadaj Kunsidoj de la Kongreso povos okazi en vasta salonego, kiu troviĝas en la posta parto. Kaj videble – bona punkto – ne mankos lokoj por interbabilado!

Sabatan vesperon, kiam la vojaĝintoj iom refreŝiĝis post sia longa veturado, oni dediĉis al nesolena akcepto, kiam ĉiu kongresano povis premi la manon al D-ro Zamenhof, kaj libere interkonatiĝi kun la ceteraj samideanoj. Orkestro konsistanta el membroj de la Ŝtata Marista Reĝimento bele ludis dum la vespero, interalie la Esperantan himnon, en kiu kunkantis plej fervore ĉiu ĉeestanto. Entreprenema ĵurnalisto intervjuis la Majstron, kies impresoj pri Ameriko poste aperis jene en la hodiaŭa eldono de la Star:—

“Tio, kio plej multe min impresis, tuj kiam mi metis piedon sur la teron en la nova mondo, estis la sento de libereco, kiu kvazaŭ vibras en la aero

usona, kaj aperas videble sur preskaŭ ĉiu vizago, kiun oni renkontas sur la stratoj. Ankaŭ min multe frapis la viva nerva energio, kiu evidente instigas ĉiun amerikanon. Estas por mi kvazaŭ nova lando, al kiu mi ankoraŭ ne tute alkutimiĝis. Novjorko estas urbego tiel kolosa, tiel dinamika, tiel tute malsimila je kiu ajn eŭropa urbo, ke ĝi inspiras ĉe mi nevenkeblan miron. Kvankam la Esperantista movado en Usono estas ankoraŭ tute juna, ĝi jam montras grandan vivopovon, kaj promesas vastan progresadon. Eble la plej grava afero por la disvastiĝado de nia afero estas la kuraĝigo kaj kora kunhelpado de la tutmonda gazetaro, kaj poste la simpatio kaj aprobo de ĉiuj lernejoj kaj kolegioj. Ke nia lingvo Esperanto tiom penetru en la lernejojn de Usono, kiom ĝi jam pli kaj pli penetras en multajn lernejojn en Eŭropo, tio estas la plej kara revo de nia tuta Esperantistaro.”

Esperanta Diservo.

Hodiaŭ matene okazis nia ĉiujara Esperanta Diservo, ĉi tiun fojon en la Episkopaliana Preĝejo de S. Paŭlo. D-ro Zamenhof ĉeestis kun multaj el la kongresanoj, ankaŭ partoprenis multaj Washington’anoj. Pastro Paul F. Hoffmann, samideano el Baltimore, kondukis la solenon, kaj Pastro James E. Smiley el Annapolis faris belan esperantan predikon. Loka geĥoristaro bone plenumis en Esperanto la muzikan parton de la

servo, kiun faciligis por la ne-Esperantistoj bonguste presita himnaro kaj predikaro en angla kaj esperanta lingvoj.

La posttagmezo estis oportuna tempo por traviziti la urbon. Unu el la diversaj turistaj aŭtomobilaj kompanioj jam presigis esperantan gvidcirkuleron, kaj multe da Esperantistoj plenigis la grandajn ĉarojn, speciale al ili rezervotajn dum la tuta semajno. Kun ĉiu aro veturis Esperanton lerninta gvidisto, kiu priblekis plej lerte per megafono ĉiun interesajon. Dank’ al tiuj ĉaroj, kaj la tre bele farita kaj presita Kongreslibro (ŝuldita precipe al la klopodoj de samideano Schubert, la U. E. A. delegito), la kongresanaro povos inspekti laŭ sia plaĉo la multe da rimarkindaj vidindaĵoj, kiuj faras Washington unu el la plej belaj urboj de la mondo.

Ĉi tiun vesperon la ĉefa okazo estis improvizita koncerto en la salonego de la hotelo. Kiel multaj Esperantistaj improvizaĵoj, ĝi bonege sukcesis, kaj jam en la komenco donis al la Kongreso tiun kamaradecon kaj familia-rondecon, kiu ĝin karakterizis dum ĉiu cetera kunveno. Tie oni havis la plezuron aŭdi inter aliaj S-ron Harris, kiu kantis la belan “Mi aŭdas vin” komponitan de si mem, kaj S-inon Williams, kiu ricevis veran ovacion por sia ĉarma prezento de “la juvela kanto” el Faust. (*Daŭrigota*)

W. W. Mann, The British Esperantist, okt. 1910

Aĉetu kanadajn librojn!

Pluraj belegaj libroj estis eldonitaj en la preparoj por la Montreala UK! Vizitu esperanto.qc.ca por informiĝi aŭ mendi!

MARIA CHAPDELAINE

Aŭtoro : Louis Hémon. Tradukis en Esperanton :

Trefflé Mercier

Prezo : 14 kanadaj dolaroj

Rakonto el franca Kanado. 201-paĝa

La franca verkisto Louis Hémon priskribas la vivon de la familio Chapdelaine komence de la 20-a jarcento en Kebekio, kiam la francaj pioniroj konkeradis la teritorion norde de Péribonka. Legante, oni konatiĝas kun la malfacila vivo de junaj viroj, kiuj forhakas netuŝitajn arbarojn en la vintra sezono :

« ... dum la neĝo, la malvarmo, la vento, la furiozaj torentoj sieĝas lin, izolas lin kaj trudas al li iun lukton preskaŭ sen paŭzo. Li uzas sian vivon por vivi. »
(El la Antaŭparolo franca de Émile Boutroux, de la Franca Akademio.)


... « kaj pri pena laboro sur la tero por semi kaj

planti manĝaĵojn de la printempo ĝis la aŭtuno por nutri la familion. Tamen ekzistis vesperoj de

ĝojo, kiam familianoj, najbaroj, geamikoj kuniĝadis, por interŝanĝi la novaĵojn pri konatoj, familianoj ; kiam ili muzikis, dancis kaj kantis havante plezuron. Tiam la unuaj amsentoj ĉe la juna Maria estis malsamaj ol hodiaŭaj ; tiam la demando estis, ĉu resti sur la tero, daŭrigi la konatan vivon, aŭ foriri al Usono, kie la vivo pli facilas en industriaj urboj kun klimato pli agraba. Maria devis fari gravan decidon. Ŝi cerbumis, pri kial resti – por kaj kontraŭ... »

Ŝi diris : « Ni venis antaŭ tricent jaroj kaj ni restis... Tiuj, kiuj kondukis nin

ĉi tien povus reveni inter nin sen amareco kaj ĉagreno, ĉar, se estas vere, ke ni ne lernis multon, certe ni forgesis nenion. »



Historia romano eldonita en 1916 en Montrealo, kiu fariĝis populara en Kanado kaj en Francio, estis tradukita en multajn lingvojn, kaj nun en la 15-an lingvon : Esperanton.

BESTA VERBARO

Aŭtoro : Normando Fleury, helpe de internacia esperantistaro, antaŭparolo de Humphrey Tonkin, ilustris Renaud Ducharme-Gilbert, eldonis Esperanto-Societo Kebekia, junio 2020.

La verbaro prezentas 38 verbojn rilatajn al bestoj, kiel « krokodili ». La 47-paĝa verbaro estas plene kolora.

Prezo : 15 kanadaj dolaroj, triona rabato por mendo de pli ol 5 ekzempleroj.

Originala verko de Normando Fleury. El la konata en Esperantujo verbo « krokodili », kaj la verbo « sciuri » kreita dum la IJK en 1994 en Montrealo, Normando kunigis pliajn tridekses bestonomajn verbojn. Li okazigis diskutrondojn dum pluraj IJK-oj kaj aliaj renkontiĝoj, kie oni kune kreis novajn

verbojn.

Amuzaj koloraj desegnaĵoj, faritaj de la grafikisto Renaud Ducharme-Gilbert, bildigas al vi la signifon de la verboj. La desegnaĵoj, kun ofte integritaj verdaj steletoj, interesos eĉ etajn infanojn. Tiu libro povas servi por ili kiel aktiva bildlibro : ili ja ŝatos ludi serĉante steletojn en ĉiu paĝo.

La libreto amuze invitas vin lingve uzi la verbojn... almenaŭ dum IJK, ĉar tie neniu ofendiĝos, se vi tion faros.

Profito el vendado iros al TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo).

BIRDOJ EN NIA KORTO

Aŭtoro : Zdravka Metz

Prezo : 30 kanadaj dolaroj

Originale verkita en Esperanto, la libro estas kolekto da rakontoj dividitaj en du temojn.

Birdoj en nia korto estas unu el dek du rakontoj pri la naturo. La aŭtoro malkovras novan aktivecon : observi la birdojn. Sed ŝi ankaŭ rakontas pri eventoj en kontakto kun aliaj bestoj : ĉevaloj,





prociono, hundo, testudido.

En la dua parto de la libro sekvas dek ok rakontoj pri vojaĝoj. La verkistino rakontas pri la oftaj helpemaj esperantistoj, kiuj, dum ŝiaj vojaĝoj kaj tiuj de aliaj, « etendis la manon » en situacioj neplanitaj kaj neagrablaj, en

kiuj tamen ĉio bone finiĝis.

La rakontoj, inspiritaj de veraj okazaĵoj, estas dediĉitaj al ŝiaj genepoj. Zdravka feliĉas dividi siajn rakontojn kun aliuloj. Kompare kun ŝia unua libro *Bestoj en nia domo*, kiu celis junajn infanojn, la nuna libro kontentigos pli aĝajn junulojn.

La libro, edukcela kaj informplena, finiĝas per vortareto kun la nomoj de birdoj kaj geografiaj nomoj de urboj, lagoj, landoj, kiujn ŝi esperantigis por faciligi la fonetikan legadon.


Tri antaŭaj eldonaĵoj

KRISTNASKAJ RAKONTOJ EL FRANCA KANADO

Aŭtoro : Louis Fréchette (1839–1908). Franclingva originalo : *La Noël au Canada ; contes et récits* (Toronto, George N. Morang, 1900). Dua, reviziita Esperanta eldono, kun la originalaj ilustraĵoj de Frederick Simpson Coburn. Traduko de Vincent Beaupré, reviziita de Francisko Lorrain kun la helpo de internacia temo. Eldonis Esperanto-Societo Kebekia, 2013

Prezo : papere 23, elektronike 14 kanadaj dolaroj.

Estas tre interesa la *Antaŭparolo de la aŭtoro por la anglalingva eldono de 1899*. Malfacile troveblas pli bonaj vortoj por priskribi la libron de ses rakontoj kaj 16 ilustraĵoj, ol tiuj de la aŭtoro mem. « *Mi havis du celojn. La unua estis trovi novtipan distraĵon, kaj la alia, fari ion por popularigi, inter homoj legantaj nur la anglan, tiun porcion de la amerika grundo nomatan franca Kanado, kun ĝiaj karakterizaj trajtoj devenantaj el ĝia klimato siaspeca, kaj precipe el ĝiaj loĝantoj, kies lingvo, konduto, kutimoj, tradicioj kaj popolaj kredoj portas esceptan stampon, kaj tial verŝajne vekas apartan intereson ĉe la ĉirkaŭantaj loĝantaroj.*



Por atingi ĉi-lastan celon, mi provis, per kelkaj plumskizoj, transdoni ian ideon pri la sovaĝa rigoro de niaj vintroj, metante kontraŭ ili, laŭvice, niajn bravajn pionirojn de la arbaro, niajn aŭdacajn aventuristojn de la Nord-Okcidento kaj niajn fortikajn dresistojn de riveraj

glacioplatoj, kies pasintaj produĵoj iom post iom forgesiĝas pro la invadanta progresado. Mi klopodis elvoki iujn el la malnovaj legendoj, revivigi iujn pitoreskajn homtipojn de antaŭ longe, kies lingvaĵo, kutimoj, kostumoj kaj superstiĉaj agmanieroj delonge malaperis, aŭ rapide malaperadas ».

Zdravka Metz, en sia Antaŭparolo por tiu libro, skribis :

« Rakontado estis granda tradicio en Kebekio. Dum la lastaj jaroj, pluraj artistoj sukcese provis revivigi ĉi tradicion. Ŝajnas al mi, ke eble ĉi libro

povus esti realigo de la deziro de la aŭtoro kaj tradukinto diskonigi la franckanadajn tradiciojn al anglalingvaj najbaroj kaj eksterlandaj samideanoj ».

Sur la lastaj paĝoj troviĝas listo de prononcindikoj de francaj vortoj kaj indekso de Esperantaj geografiaj nomoj.

NANATASIS


Aŭtoro : Robert Dutil. Franca originalo : Nanatasis. Tradukita el la franca de pluraj anoj de ESK.

La tradukojn kunigis Zdravka Metz, reviziis Edmond (Kajmo) Brent, kaj eldonis Esperanto-Societo Kebekia en 2005.

La vorto Nanatasis estas la nomo de la ĉefa rolulino, juna aŭtoĥtonino. La signifo de Nanatasis, en la abenaka lingvo, estas « kolibro » kaj ankaŭ « transformiĝanta ».

La libro konsistas el dudek rakontoj, kiel fabeloj, sur 112 paĝoj.

Soleca kanuanto decidas esplori grandan arbaron de la Alagaŝa regiono veturante sur rivero komence de aŭgusto, kiam la vetero belas kaj la kuloj estas malpli voremaj. Komence li ĝuis sian esploradon, tagon, sunon, renkontitajn bestojn. Unuloke, li devis transiri viglan akvofluon, sed li



estis jam laca kaj li urĝe bezonis ripozi, sed...

La kanuanto priskribas sian vekiĝon pere de zumado de kolibro, post la akcidento kaj vundiĝo. Li sentis sunon, doloron ĉe la kapo, brakoj kaj ŝultro. La kanuo estis haltinta ĉe granda ŝtono, sed pro sia vundiĝo li ne plu kapablis remi. Tiel li renkontis la junulinon Nanataŝis.

Ŝi vivas en pura naturo — naturo netuŝita de homo. La junulino provas kuraci kaj nutri la fremdulon laŭ sia tradicia maniero. Nanataŝis, tre scivolema, starigas multajn demandojn pri la moderna civilizacio. La edukita kanuanto respondas al ŝiaj plej diverstemaj demandoj.

Nanataŝis plej miras pri armeoj kaj militoj, kiujn ŝi ne konas, parolante pri interkonsento kaj helpo de unu homo al la alia.

« *La traduko estas flua, akompanas ĝin dudeko da allogaj tutpaĝaj koloraj bildoj, reproduktitaj de akvarelaĵoj pentraĵoj. Malkutima verko, konvena ankaŭ por junuloj.* »

Recenzis Stefan MacGill

Post la rakontoj troviĝas dupaĝa abenaka-Esperanta glosaro, kiu klarigas la signifojn de la abenakaj vortoj uzitaj en la rakontoj.

LA ETA PRINCO

Aŭtoro : Antoine de Saint-Exupéry (1900–1944).
Franclingva originalo : *Le petit prince* (New York, Reynal & Hitchcock, 1943, poste Parizo, Gallimard, 1946). Tria, reviziita Esperanta eldono, kun la originalaj ilustraĵoj de la aŭtoro. Traduko de Pierre Delaire, reviziita de Francisko Lorrain, kun la helpo de plurhoma internacia teamo. Eldonis Kanada Esperanto-Asocio, 2010.

Prezo : 15 kanadaj dolaroj ene de Kanado, 18 ekster Kanado. Informiĝu ĉe esperanto.ca/index.php/la-eta-princo-eo/.

Tiu monde konata kaj disvastigita verko de Saint-Exupéry estas tre ŝatata de plej diversaj homoj el ĉiuj aĝoj. Ĝi postulas, kaj meritas, tre zorgan tradukadon. Tiun taskon entreprenis la tria-eldona teamo. Malgraŭ sia modesta prezo, tiu eldono estas altkvalite enpaĝigita kaj presita.

Saint-Exupéry estis pionira franca aviadisto, famiĝinta pro siaj pluraj libroj, belege verkitaj, en



kiuj li priskribis siajn profesiajn spertojn kaj enpensiĝis pri ili. Li verkis nur unu libron celantan infanojn, *La Eta-n Princon*, kiun tamen tuj ekŝatis multegaj plenkreskuloj. *La Eta Princo* estas eldonita de Kanada Esperanto-Asocio (KEA).

De la redakcio : Francisko Lorrain, kiu kunordigis la

eldonon de *La Eta Princo* kaj de Kristnaskaj Rakontoj el Franca Kanado prelegis du-foje pri tiuj ĉi eldonaĵoj dum MondaFest' ! Kadre de #mondafest2020, UEA anoncis tiun ĉi eventon la 29-an de junio, okaze de la datreveno de la naskiĝo de Antoine de Saint-Exupéry. La 31-a de julio aliflanke estas la datreveno de la lia mistera forpaso -- ĝuste en tiu ĉi tago okazis la prelego pri *La Eta Princo*, kiun kunordigis Akademio Literatura de Esperanto. Spektu ĝin ĉi tie : <https://youtu.be/NeKangYruds>.

La prelego pri Kristnaskaj Rakontoj el Franca Kanado spekteblas en la YouTube-video de la Tago de Ameriko : <https://youtu.be/IAeaTnP1tFM> (ĝi komenciĝas je la 2-a horo 22 minutoj).

La Eta Krokodilo kaj la Verda Stelo

Iam estis eta krokodilo, kiu loĝis en bestoĝardeno. Sed, li ne estis feliĉa, li volis esti libera. Iun vesperon, li levis la kapon kaj vidis stelon, kiu brilegas...

Sekvu la aventuron de la Eta Krokodilo kaj la Verda Stelo, fabelo por etuloj kaj plenkreskuloj pri libereco, amikeco kaj espero por pli bela mondo.

Verkistoj: Cécilia Guérin & Maximilien Guérin

Eldonejo: L'Harmattan (Jeunesse) - Parizo,

Francio. ISBN: 978-2-343-23117-4

La libro estis kontrolita de la Franca Esperanto-Instituto (FEI). En la eldonejo-retejo: [klaku ĉi tie](#).

Recherche avancée

Catalogue Nouveautés Ebooks Nos auteurs Notre maison Événements Recrutement Compte client

Le Petit Crocodile et l'Étoile Verte / La Eta Krokodilo kaj la Verda Stelo

Cécilia Guérin, Maximilien Guérin

Collection : Jeunesse

Livre papier : 12 €

JE COMMANDE

Livraison à 0,01 €*
* A destination de la France métropolitaine, sans minimum d'achat

Version numérique* : 8,99 €

JE TÉLÉCHARGE LE PDF

DU MÊME AUTEUR

- Le Croissant linguistique : entre oc, oil et francoprovençal. Des mots à la grammaire, des parlers aux aïeux. Sous la direction de Louise Esher, Maximilien Guérin, Nicolas Quint & Michela Russo - 2021
- Le parler marchois d'Oradour-Saint-Génést (Haute-Vienne). Maximilien Guérin - 2020
- Cortes et histoires en parler de Naves (Allier). Corpus textuel transcrit et traduit. Henri Grobost, Rose-Marie Grobost, Maximilien Guérin - 2020

* Compatibles avec l'ensemble des liseuses et lecteurs du marché.

Mistero de Kajlaŝo

Tre vaste konata legendo diras, ke en la monto Kajlaŝo situas unu el la enirejoj en fablan landon Ŝambalon. Tie loĝas estaĵoj ekipitaj per supernaturaj kapabloj. Sen ilia permeso neniu homo rajtas eniri. La enirejon gardas sep pordegoj kaj ĉe ĉiu pordego estas iaspeca kaptilo.

Jam ĉe la unua pordo la homo rapide aĝiĝus kaj post kelkaj horoj mortus. Ne multaj inter ni kredus tion, sed profesoro Ernst Muldaŝev, mondkonata oftalmologo profesie kaj faktoserĉanto amatore, nun asertas, ke tiu legendo enhavas iom da vero.

Li mem vizitis Tibeton plurfoje kaj ĉe la monto Kajlaŝo konstatis, ke tie la tempo pasas kvazaŭ pli rapide: dum li, kune kun grupo de aliaj sciencistoj, tendumis tie, dum nur 12 horoj la ungoj sur iliaj fingroj kreskis tiom, kiom kutime okazas dum du semajnoj. Same okazis al iliaj hararoj. La lamaoj diris al Muldaŝev, ke la kaŭzo estas radiado el la unua subtera pordego. Tiu, kiu tuŝus ĝin, maljuniĝus multe pli rapide.



Monto Kajlaŝo havas pliajn misterojn. Inter tiuj estas ĝia alteco. La oficiala alteco, laŭ ĉiniaj geografiaj fontoj, estas 6714 m, sed laŭ lamaoj estas nur 6666 m, ĉar sur la supro estas konstruita piramido. Eĉ geologoj pridubas naturan devenon de la perfekta

pyramido, kies flankoj estas orientitaj laŭ la kvar mondf flankoj. Laŭ la lamaoj, la piramido estas kava – sed tion ĝis nun ne eblas pruvi.

La sciencistojn tutmonde fascinas la geografia situo de la monto. La distanco de la Norda poluso estas 6666 km, de la Suda

poluso 13 332 km (1:2). La distanco inter Kajlaŝo kaj la Stonehenge estas ankaŭ 6666 km.

Se ni sekvas la meridianan kuniĝon de Kajlaŝo al la Norda poluso kaj daŭrigas sur la mala flanko de la Tero, ni preterpasas la plej misteran lokon en Meksikio, la Teotihuacan-on. Se ni farus imagitan linion trans la terglobo, de la Norda duonglobo al la Suda duonglobo, ni atingus tie la misteran Paskan Insulon.



Ĉu ĉio estas nura hazardo? Laŭ Muldaŝev, ne. La lamaoj referencas kataklizman eventon (antaŭ eble 40 mil jaroj?), la forklinon de la tera akso je 60 gradoj. Tiam preskaŭ malaperis la pli frua civilizacio, supozeble, postvivis nur tiuj, kiuj antaŭvidis tion, kaj la tiamaj civilizacioj vivas nun en la entera regno Ŝambhala. Onidire, ili nun komunikas kun ni per la diversaj grandiozaj desegnoj, aperantaj sur la altebenaĵoj, vastaj kampoj aŭ neĝkovritaj spacoj.

Konklude: la monto Kajaŝo estas la plej granda geologia enigmo. Eĉ por la plej spertaj montgrimantoj ĝi estas ĝis nun tabua. Ĉu la estonteco alportos respodojn?

Reber, por Lumo esperantigis Olga du Temple

La artikolo verkita en la ĉeĥa lingvo aperis e-poŝte en oktobro 2021.



Ĉi-aŭtune la Montreala LKK provis diversajn tagajn ekskursojn en la preparoj por 2022!



Kanada Esperanto-Asocio

La estraranoj de KEA dum 2020–2021:

- Prezidanto: Paul Hopkins — Sooke BK
- Vic-prezidanto: Geoffrey Greatrex — Otavo ON
- Kasisto: Raymond Brisebois — Londono ON
- Sekretario : Bob Williamson — Halifakso NS
- Redaktoro: *provizore faras Ĵenja Amis*
- Estrarano: Ĵenja Amis — Montrealo QC
- Estrarano: Andrew (Andreo) Sly — Viktorio BK
- Estrarano: Tiffany Antopolski — Toronto ON
- Estrarano: Jed Meltzer — Toronto ON (demisiinta)
- Estrarano: Eric Demers — Londono ON (demisiinta)

Adreso:

110 Grand Ave. 414, London, Ontario, N6C 1L8,
Kanado

Retejo: <https://esperanto.ca/>

Facebook: facebook.com/KanadaEsperantoAsocio

YouTube: [youtube.com/channel/
UCVBXZyk2N436ot4qlug-2ng](https://youtube.com/channel/UCVBXZyk2N436ot4qlug-2ng)

La Lumo

Redaktoro: Ĵenja Amis. **Provlegistoj kaj helpantoj:** Bob Williamson, Francisko Lorrain.

Renkontiĝoj en Kanado

Montrealo kaj Kebekio, **Parolu ni Esperante**: la dua lundo kaj la lasta vendredo de la monato, 19:00

Viktoria Kafejo de Esperanta Kulturo: ĉiusabate, 10:00

Halifaksa Videkunveno: dimanĉe, 11:00

Toronta Konversacio por Komencantoj: dimanĉe, 13:00

Alberta Kunvenu! marde, 19:00

Otavo Konversacia rondo tutmonda: la lasta ĵaŭdo monate, 19:00

Londono, Ontario: sabate je la 14-a horo

Vizitu Eventan Servon por ĉiuj detaloj!

<https://eventaservo.org/>

Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi : www.pasportaservo.org.

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.